HUNGARA VIVO

3
1979
11,- Ft

KOMENCU ĈE SKALA!

NI ATENDAS VIN

de la 8-a horo ĝis la 19-a horo en nia sekcio

de multspecaj industri-varoj

de la 7-a horo ĝis la 20-a horo en nia nutraj-sekcio

SKÁLA

Kliento-servo: 850-850

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193 H–1368
Aperas dumonate
XIX. jaro 1979. Nro 3
(85)

ENHAVO

Fejes, M.: Zsigmond Móricz – verkisto de realismo 82
Móricz, Zs.: Sep krejceroj 84
Móricz, Zs.: Nur la boneco helpas ĉi tie (VHZs) 86
Mihalkov, G.: Tri verkoj de Móricz – aperas 87
Móricz, Zs.: La stipendio (J. *Sárközy*) 88
Móricz, Zs.: La justo de la nevenkebla imperiestro (D-ro I. *Nagy*) 90
Nervi, M.: Balado 90
Ady, E.: Kvazaŭ letero al Zsigmond Móricz (M. *Fejes*) 91
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 9. (VHZs) .. 92
Torda, L. Jarcentoj de la hungara literaturo (P. A. *Rados*) 94
Janus *Pannonius:* Pri Papo Paŭlo, Al Silvia, Por la paco (K. *Kalocsay*) 95
Fenyvesi, E.: Malgrandaj eklezioj en Hungario 96
Benczik, V.: Budapeŝta Informilo jubileas 97
Gergely; M.: József Rippl-Rónai .. 99
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 100
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj ... 102
Tölgyesi, L.: Vortfinaj fonemoj en Esperanto 103
D-ro László, F.: Elstara agado de Stefano Széchenyi en la evoluigo de la hungarlanda akvomastrumado (A. *Pechán*). ... 104
Bálint, Sz.: La dolĉa nupto 112
Kapitány, L.: Petrolminado en Hungario 113
Kiel mendi Esperantajn librojn? .. 115
Recenzoj de V. *Benczik*, G. *Mihalkov*, A. de *Giorgi*, E. *Fenyvesi*, *VHZS*. 116
Krucenigmo 119
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko 119
Leterkesto, Korespondi deziras ... 120

Sur la kovrilpaĝo pentraĵo de J. Rippl-Rónai pri Zsigmond Móricz (1923)

Ni prezentas al vi...

proziston, kiu estis nepre unu el la plej suverenaj kreantoj de la hungara literaturo en tiu ĉi jarcento. Lian karieron, traarkantan tri jardekojn, akompanas amaso de sociaj eventoj: li debutas en la pseŭd-idilia „bela paco" de la Aŭstra-Hungara Monarkio, kaj mortas la 4-an de septembro 1942, kiam la unuan fojon falas bomboj sur Budapeŝton dum la dua mondmilito.

Nepre li estas tiu prozisto, en kies verkoj plej adekvate kaj fidele respeguliĝas la hungara vivo de tiuj tri jardekoj. Lin altiris unuavice la vilaĝo, la vivo de la kamparanoj, kiuj tiutempe konsistigis ĉ. tri kvaronojn de la hungara loĝantaro. Li priskribis unuavice ties mizeron materialan kaj spiritan, samtempe montrante ankaŭ la plej pozitivajn kvalitojn de la hungara kamparanaro.

Prezenti proziston sur kelkaj paĝoj estas preskaŭ neeble: ni povas esperi nur, ke tiu ĉi specimeno tamen donos imagon pri la esenco de la verkaro de Zsigmond *Móricz*.

En tiu ĉi numero ni komencas novan serion: *Jarcentoj de la hungara literaturo*. Multaj elstaraj esperantistoj ĝis nun eldiris tre pozitive pri nia literaturo, laŭ verkoj legitaj en Esperanto. Ni kredas, ke tiu ĉi literaturhistoria serio povos iel sistemigi la konojn de eksterlandanoj pri la hungara literaturo, donos konturojn pli klarajn al jam konataj verkoj, kaj ankaŭ stimulos por konatiĝo kun aliaj.

La artikolo de L. *Tölgyesi* prezentas interesajn indikojn pri la Esperanta vorttrezoro. L. *Kapitány* artikolas pri la hungara petrolminado, dum E. *Fenyvesi* konigas la vivon de malgrandaj eklezioj en Hungario. Kiel kutime, ni aperigas ankaŭ vastan recenzan rubrikon.

En la antaŭa numero ni faris provon por pli allogigi teknike nian revuon: ni volonte aŭdus la opinion de niaj legantoj: ĉu ili plaĉe akceptis la dukoloran preson de la internaj paĝoj, aŭ trovas tion nenecesa balasto?

Kiel vi povas konstati, ni sukcesis plenumi nian promeson pri la reĝustigo de la aperritmo: pri tio dum la lasta tempo HV fariĝis kvazaŭ „monata" revuo. Ankaŭ la n-ro 1979/4 aperos baldaŭ: komence de julio; kaj poste vi povos esti certa, ke la poŝtisto regule sonorigos ĉe vi kun la aktuala numero de HV ĉiam komence de la neparaj monatoj (septembro, novembro, januaro, ktp.)

Nia Redakcio faras ankaŭ intensan laboron por pligrandigi la nombron de la abonantaro. Tamen, estas malfacile el Budapeŝto persvadi esperantiston ekz. en Sofio, Stokholmo aŭ Novjorko por aboni Hungaran Vivon. Tion plej efike povus fari tiuj niaj abonantoj, kiuj loĝas en tiuj urboj.

Ĉu ni povas kalkuli pri via helpo?

Márton Fejes

Zsigmond Móricz – verkisto de realismo



Zsigmond Móricz

Zsigmond Móricz (jigmond moric) estas unu el la plej signifaj verkistoj de kritika realismo en la hungara literaturo de la 20-a jarcento. Liaj verkoj jam en lia vivo fariĝis konataj ankaŭ eksterlande, pluraj el ili aperis germane, france, angle, ĉeĥe, ktp. En Esperanto estis legeblaj ĝis nun nur kelkaj liaj noveloj. Inter tiuj ankaŭ du gravaj: „Sep krejceroj" er. HV (1961/3–4 kaj en tiu ĉi numero), kaj „Malriĉaj Homoj" en Hungara Antologio. Pri tiu lasta juĝis Reto Rossetti, ke ĝi apartenas al la dek plej bonaj noveloj de mondliteraturo.

* * *

Zsigmond Móricz naskiĝis la 29-an de junio en 1879 en la nord-orienta provinco Nyirség, kiel filo de laborema kaj entreprenema malriĉa kamparano, edziniginta filinon de kalvinana pastoro. Malgraŭ la malfacilaj viv-cirkonstancoj de la familio, la filo studas en la kolegioj de Debrecen kaj Sárospatak, poste ekstudas ankaŭ teologion. Revekiĝo de verkistaj ambicioj tamen ne lasas lin, kaj li baldaŭ eklaboras kiel ĵurnalisto.

Enirpago: Sep krejceroj

La jam edziĝinta ĵurnalisto, vivanta inter premaj financaj zorgoj, senĉese frapadas ĉe la pordo de la literaturo, longe sensukcese. La trarompo okazis nur en 1908 per la novelo „Sep krejceroj", verkita ĉe la katafalko de lia dua mortinta filo. Sekvontjare eldono de samtitola novelaro jam portas al li ne nur famon efemeran, sed ankaŭ eblon por plene disvolvi sian verkistan talenton.

La debuto okazis en la nove fondita literatura revuo Nyugat, kiu jam per la elektita titolo (Okcidento) deklaris sia celo konigon de la plej bonaj spiritaj kaj artaj tendencoj de Eŭropo, samtiel ĝi konsideris grava propra tasko rehavigi al la literaturo la rolon de antaŭenpuŝanto de la socia progreso. Sukcesa estis renkontiĝo de la ĵus startintaj revuo kaj verkisto, ekestis daŭra ligo inter ili. Nyugat eĉ tiam estos por li forumo, kiam post la revoluciaj jaroj pro bojkoto far oficialaj instancoj li ne povas aliloke publikigi siajn verkojn. En la jaroj 1929–1932 li estis ankaŭ kunredaktoro de la revuo.

Kio estis la sekreto de la abrupta sukceso, kiel eblis per unusola novelo, respektive novelaro konkeri la literaturon? – La sekreto estas: noveco de liaj noveloj, en kiuj li jam liberiĝis de prema efiko de verkistoj-antaŭuloj; anstataŭ idilio kaj anekdoteska fino li krude, naturalisme priskribas la mizeran vivon de vilaĝanoj. Mankas ĉe li la romantismo kutimita per la verkoj de Jókai, idilio de Mikszáth, kaj estas por li fremda la ŝveba revomondo de la samtempulo *Krúdy*. Ĉe li la ŝajne idilia historio finiĝas per tragika akto, la rido ŝanĝiĝas plorego. Tiu kunfando de rido kaj ploro, komedio kaj tragedio donas al liaj noveloj draman streĉitecon. La samo validas ankaŭ por liaj postaj gravaj novelaroj: „Malriĉaj homoj" (1917), kaj „Barbaroj" (1932).

Amiko de Endre Ady

Post debuto de la novelisto baldaŭ sin prezentas la dram- kaj romanverkisto. La disvolviĝon de lia verkista talento grave akcelas lia amikeco kun Endre *Ady*. Komuna kritikemo al la hungara subevoluinteco, simila mondkoncepto, komunaj bataloj kunligas ilin. Sed dum Ady estas revoluciulo ankaŭ en la politika senco de la vorto, la revoluciemo de Móricz estas plie morala.

Lia unua granda romano estas *Or-koto* (1911), en kiu la verkisto volas pruvi, ke la kamparanaro havas valorajn ecojn, kapablojn, kiuj tamen pro la premaj sociaj cirkonstancoj ne povas disvolviĝi, trafas misvojojn, la oro – fariĝas koto.

Dum la mondmilito Móricz el la unua frontlinio sendas militraportaĵojn. Komence li estis erarigita de la mensogaj, ŝovinismaj devizoj, sed vidante suferojn kaj sangoferojn, li ĉiam pli akre prezentas la senhomecon kaj kontraŭpopolecon de la imperiisma milito; ankaŭ lia mondkoncepto fariĝas pli radikala.

La alia granda romano de la unua, naturalisma periodo de la verkisto, „La torĉo" (1917) ankoraŭ montras necertecojn de lia mondkoncepto, t.e.: li vidas kaj prezentas pekojn de la socio, respondecon de ties gvidantoj, sed ne vidas kielon de ebla solvo.



Zsigmond Móricz kun la fama kantistino Lujza Blaha („Alaŭdo de la nacio") en 1910

25 jara jubileo de „Nyugat" en 1932. De maldekstre la kvara estas Zs. Móricz apud li M. Babits, poste la edzino de Babits: Sophie Török. Dekstre la unua estas F. Karinthy, apud li D. Kosztolányi.

Tamen, dum la revolucio kun asteroj (vd. HV/1978/5) li jam trovas sian vojon, aktive partoprenas en fondo de nova mondo; organizas asocion de progresemaj verkistoj, artikolas pri bienreformo, ktp., pro kio post falo de la Konsilia Respubliko li suferas persekutojn.

Fekundaj jaroj

Pro atakoj far konservativuloj kaj bojkoto far oficialaj instancoj sola publikeblo restas por Móricz la revuo Nyugat. Tie aperas de li en 1920 romano, kies titolo estas samtempe programo kaj konfeso: „Estu bona ĝis la morto". En la romano ŝajne temas pri travivaĵoj lernojaraj, li prezentas propran mondon de knabaĝo, sed fakte en tiu verko li konfesas pri propraj suferoj doloroj post falo de la proletdiktaturo.

Ankaŭ en liaj postaj historiaj romanoj: *Fea ĝardeno, La granda princo,* kaj *La ombro de Suno,* rakontante pri historio de mezepoka Transilvanio li parolas al sia epoko.

Fine de la 20-aj jaroj li denove turnas sin al la sia tempa realo, al problemoj de la tiama Hungario. En pluraj verkoj li analizas vivon kaj karakteron de la malriĉiĝinta meznobelaro (*Ĝis la hela tagiĝo,* 1926; *Nobelara amuzo,* 1928), sed en *Parencoj* (1932) li perdas la lastan guton de simpatio al ili, esprimas plenan perdon de iluzioj, diras klaran, definitivan juĝon pri la degenerinta meznobelaro kaj pri la al ili simila hungara meza klaso.

En la tridekaj jaroj startas literatura movado de t.n. „popolaj verkistoj", kiuj skribas lian nomon sur sia standardo. Tio vigligas lin ĉiuterene, li ekredaktas la revuon „Kelet Népe" (Popolo de Oriento), organizas, multe vojaĝas, en liaj verkoj denove sin turnas al la kamparanaro.

Pro popularеco: La eldonejo Magyar Helikon akceptas antaŭmendojn por serio de verkoj presataj de Zsigmond Móricz

En la romano „Feliĉa homo" (1935) per sociografia fideleco li prezentas la situacion de la malriĉa kampularo. En „Betjaro" (1936) li priskribas kamparanon ribeleman kontraŭ sia sorto. La saman penson li volas ekspliki en sia lasta, nefinita verko, en „Sándor Rózsa". Ties unua volumo estas multrilate la plej riĉa disvolviĝo de la krea arto de Móricz, sintezon de epiko kaj liriko, popolfabeleska romantiko kaj plenforta realismo li kreis en tiu libro. La dua volumo de la planita trilogio jam estas iom pala, kaj por la tria jam tute ne restis por li tempo. Li mortis la 12-an de septembro en 1942.

„Via verko vin postvivas . . ."

„Mi sentas, ke mi forpasos, sed venos nova vivo de ĉie. Kaj senti tion estas bele kaj bone" – li skribis en sia taglibro. – Kaj la forpason fakte sekvis nova vivo. Lia vivoverko post la liberiĝo disvastiĝis en grandegaj ampleksoj. Unu post la alia aperis reeldonoj de liaj verkoj, kaj multe kontribuis al lia popularigo ankaŭ la filmarto: liaj plej signifaj verkoj aperis sur ekrano de kinejoj kaj de televido.

Zsigmond Móricz

Sep krejceroj

Bone ordonis la dioj, ke ankaŭ malriĉa homo povu ridegi.

Ne nur plorado aŭdiĝas en la kabano, sed ankaŭ sufiĉe da elkora ridego. Eĉ tio estas vera, ke malriĉa homo preferas ridi, kiam li havus kaŭzon por plori.

Bone mi konas tiun ĉi mondon. La generacio de la familio *Sós,* el kiu ankaŭ mia patro devenas, provis eĉ la plej malfacilan staton de la mizero. Tiutempe mia patro estis laboristo por tagsalajro en iu maŝinlaborejo. Nek li, nek aliaj fanfaronas pri tiu tempo. Kvankam tio vere okazis.

Ankaŭ tio estas vera, ke mi ne ridegos tiom dum mia estonta vivo, kiom dum ĉi tiuj kelkaj jaroj de mia infanaĝo.

Kiel mi ja ridegus, se mi jam ne havas rugvizaĝan, gajan patrinon, kiu tiel dolĉe povis ridi, ke fine larmoj falis el ŝiaj okuloj kaj tuso kaptis ŝin, preskaŭ sufoka . . .

Sed eĉ ŝi ne ridegis tiel, kiel ni ridegis, pasiginte tutan posttagmezon per serĉado de sep krejceroj. Ni serĉis kaj ankaŭ trovis. Tri en la tirkesto de la kudromaŝino, unu en la ŝranko . . . la ceteraj troviĝis pli malfacile.

La unuajn tri krejcerojn trovis mem mia patrino. Ŝi kredis, ke ŝi trovos eĉ pli en la tirkesto, ĉar ŝi kudris por mono, kaj kiam oni pagis, ŝi metis tiun monon en la tirkeston. Tiu tirkesto estis por mi neelĉerpebla trezorejo, en kiun oni nur devas meti la manojn, kaj tuj la tablo pleniĝos per multaj bonaj manĝaĵoj.

Mi admiris, kiam mia patrino serĉis en ĝi; fingringon, kudrilon, rubandpecetojn, ŝnuron, butonon, ĉion ŝi disskrapis kaj subite ŝi diris mirege:

– Ili kaŝiĝis.

– Kiuj?

– La moneroj – diris ekridegante mia patrino.

Ŝi eltiris la tirkeston.

– Venu, mia fileto, tamen ni serĉu la friponetojn. Friponetaj krejceroj!

Ŝi kaŭris sur la teron, kaj tiel ŝi demetis la tirkeston, kvazaŭ ŝi estus timinta, ke ili elflugos; eĉ ŝi kovris ĝin subite, kiel oni kaptas papilion per ĉapelo. Ne estis eble ne ridegi pri tio.

– Ĉi tie ili estas, enestas – ŝi ridadis kaj ne rapidis por malkovri ĝin –, se nur unu estas, ĝi devas esti ĉi tie.

Mi kaŭris surteren kaj tiel mi observis, ĉu ne elkaŝiras iu brila moneto? Moviĝis tie nenio. Estas vere, ke ni eĉ ne kredis, ke en ĝi povas esti io.

Ni rigardis unu al la alia kaj ridis pri la infaneca ŝerco.

Mi tuŝis la tirkeston renversitan.

– Pst! – atentigis min mia patrino – silente, ĉar ĝi forfuĝos. Vi ankoraŭ ne scias, kiel vigla besto estas la krejcero. Tre rapide ĝi kuras, ruliĝas. Ho, kiel ĝi ruliĝas . . .

Ni faladis tien-reen pro la rido. Multe ni spertis jam, ke tre facile ruliĝas la krejcero.

Kiam ni rekonsciiĝis, mi denove etendis la manon por renversi la tirkeston.

– Ve! – kriis al mi denove mia patrino, kaj mi ektimis, retirante mian fingron kvazaŭ ĝi estus tuŝinta la fajrujon.

– Atentu, malŝparuleto. Kiel vi rapidus montri al ĝi la vojon! Ĝi apartenas al ni, dum ĝi estas ĉi tie sube. Nur estu ĝi tie ankoraŭ iom. Ĉar, vi vidas, mi volas lavi, por tiu laboro mi bezonas sapon, por sapo necesas minimume sep krejceroj, ja por malpli oni ne vendas ĝin. Mi jam havas tri, ankoraŭ bezonas kvar, tio estas ĉi tie, en tiu ĉi dometo; ĉi tie ili loĝas, sed ili ne ŝatas, se oni ĝenas ilin, ĉar se ili ekkoleriĝas, ili foriros, kaj neniam ni revidos ilin. Do atentu, ĉar la mono estas tre afektema, atente oni devas agi per ĝi. Honeste. Tre rapide ĝi ripoĉas, kiel la riĉaj fraŭlinoj . . . Hej, ĉu vi ne konas ian allogan versaĵon? Eble per ĝi ni povos ellogi ĝin el ĝia konko de heliko.

Ho, kiom ni ridegis dum tiu ĉi babilado! Mi ne scias. Sed la allogado de la heliko estis tre stranga:

Elvenu onklo mono!
Brulas ja via domo.

Kaj mi renversis la domon.

Estis sub ĝi centspecaj balaaĵoj, nur mono, tio ne estis.

Mia patrino skrapadis, ŝiaj lipoj estis acide tiritaj, sed vane.

– Kiel domaĝe – ŝi diris –, ke ni ne havas tablon. Se ni estus renversintaj la tirkeston sur tablon, estus pli granda la honoro, tiam estus sub ĝi . . .

Mi kunskrapadis la multajn aĉaĵojn acajojn kaj metadis ilin en la tirkeston. Dume mia patrino pensadis. Forte ŝi pensadis, ĉu ŝi ne metis ien ian monon, sed ne rememoris.

Sed ankaŭ mi pensadis.

– Patrino, mi scias lokon, kie estas krejcero.

– Kie, mia filo? Ni serĉu ĝin, antaŭ ol ĝi degelus, kiel neĝo.

– En la vitrita ŝranko estis, en la tirkesto.

– Ho, malfeliĉa infano, estas bone, ke pli frue vi ne diris. Nun eĉ tion ni ne havus.

Ni stariĝis kaj iris al la vitrita ŝranko, kiu jam delonge ne havis vitrojn, sed en ĝia tirkesto estis tie la krejcero, kie mi sciis pri ĝi. Jam tri tagojn mi intencis forŝteli ĝin de tie, sed neniam mi kuraĝis. Mi estus aĉetinta sukeron per ĝi, se mi estus havinta kuraĝon por tio.

– Nu, ni jam havas kvar krejcerojn. Ne estu malgaja, fileto mia, ni havas jam la pli grandan parton. Nun jam ni bezonas nur tri. Kaj se ĉi tiujn kvar ni serĉis dum horo, tiujn tri ni trovos ĝis la posttagmeza manĝado. Tamen mi povos lavi sufiĉan kvanton ĝis vespero. Venu, venu, eble ankaŭ en la aliaj tirkestoj estos po unu.

Ho, se estus en ĉiuj tirkestoj. Tiam ni havus multajn. Ĉar la maljuna ŝranko en sia pli juna aĝo servis en tia loko, kie estis multaĵoj por kaŝi. Sed ĉe ni ĝi ne estis tre ŝarĝita; ne vane ĝi estis tiel malsana, vermomanĝita, dentmanka.

Mia patrino faris predikon por ĉiu nova tirkesto.

– Tiu ĉi tirkesto estis riĉa. Tiu ĉi alia neniam havis ion. Kaj tiu ĉi vivis ĉiam el kredito. Nu, vi malbona, pestaĉa, ĉu ankaŭ vi ne havas krejceron? Ho, tiu ĉi neniam havos, ĉar ĝi gardas nian malriĉecon. Vi eĉ ne havu, se nun, kiam foje mi petas, eĉ nun vi ne donas. Tiu ĉi havas la plej multon! – kriis, kiam ŝi eltiris la plej malsupran tirkeston, kiu eĉ fundon ne havis.

Ŝi pendigis ĝin sur mian kolon, poste ni sidis sur la teron. Atendu, – ŝi

diris subite – tuj ni havos monon. En la poŝoj de via patro ni trovos.

En la muro estis najloj, sur tiuj pendis la vestoj. Kaj mirinde, kiam mia patrino ŝovis la manon en la unuan poŝon, tuj enmaniĝis krejcero.

Apenaŭ ŝi kredis al siaj okuloj.

– Mi trovis – kriis ŝi –, ĉi tie ĝi estas! Kiom ni havas jam? Unu, – du, – tri, – kvar, – kvin . . . Kvin! Nun jam nur du ni bezonas! Kiom estas du krejceroj? Neniom! Kie kvin jam kunestas, tie troviĝos ankoraŭ du.

Kun granda fervoro ŝi traserĉis ĉiujn poŝojn, sed bedaŭrinde, vane. Eĉ unu ŝi ne trovis. Eĉ la plej bona ŝerco ne ellogis ankoraŭ du krejcerojn. Jam grandaj ruĝaj rozoj brulis sur la vizaĝo de mia patrino, pro la ekscititeco. Por ŝi ne estis permesate labori, ĉar tuj ŝi malsaniĝis. Nature, tio ĉi estis eksterordinara laboro: ne estas eble malpermesi al iu serĉadi monon.

Alvenis la tempo de la posttagmeza manĝo, ĝi jam eĉ pasis. Baldaŭ estos vespero. Mia patro morgaŭ bezonos puran ĉemizon, kaj ni ne povas lavi. La nura putakvo ne forigas tiujn oleajn makulojn.

– Ho, ho, mi, mi azeno! Mian propran poŝon mi ne rigardas. Ho, jes, se mi jam rememoras tion, mi rigardos.

Ŝi rigardis. Kaj ankaŭ tie ŝi trovis krejceron. La sesan.

Febro nin kaptis. Nun jam nur unu ni bezonas.

– Montru ankaŭ vian poŝon! Eble estas ankaŭ en ĝi.

Mia poŝo. Nu, mi povas ĝin montri. En ĝi estis nenio.

Vesperiĝis, kaj ni estis tie kun ses krejceroj, kvazaŭ ni estus havintaj neniom. Ĉe la vendisto ni ne havis krediton, la najbaroj estis malriĉuloj, kiel ni, kaj . . . unu krejceron tamen ni ne petos!

Ne estis eble fari alie, ol plenkore ridi pri nia mizero.

Kaj tiam enpaŝis almozulo. Per kantanta voĉo, li faris grandan petegadon.

– Lasu, bona homo, – ŝi diris – hodiaŭ dum la tuta posttagmezo mi kuŝas, ĉar mankas al mi krejcero por la prezo de duonfunto da sapo.

La almozulo, maljunulo kun pia vizaĝo, ekmiris:

– Ĉu krejcero? – li demandis.

– Jes.

– Mi donas.

– Ho, tion ni ne bezonas: almozon de almozulo.

– Lasu, filino, por mi ĝi ne mankos. Por mi mankas nur unu afero: pioĉo da tero. Per ĝi ĉio iĝos bona.

Li metis la krejceron en mian manon kaj forlamadis.

– Nu, dank' al – diris mia patrino – kuru do . . .

Tiam por momento ŝi ekhaltis, kaj ege, ege ŝi ridegis.

– Je taŭga tempo estas kune la mono; hodiaŭ mi jam ne povos lavi. Estas jam malhele, kaj mankas al ni ankaŭ petrolo.

Ŝi sufokiĝis pro la ridego. Dolora, murda sufoko – kaj kiam mi stariĝis apude por apogi ŝin, kaj kiam ŝi kliniĝadis kun vizaĝo kaŝita en siaj du manplatoj, ia varmo fluis sur miajn manojn.

Sango tio estis, ŝi kara, sankta sango. Sango de mia patrino, kiu tiel sciis ridegi, kiel eĉ inter malriĉaj homoj scias malmultaj. (1908)

Trad.: *Sándor Szalay*

Zsigmond Móricz:

Nur la boneco helpas ĉi tie

Nun sekvas la vera leĝo de Kristo.

Dum mia vivo nur malofte kortuŝis min vorto, kiom la deklaro, eldirita tute mallaŭte kaj simple de juna soldateto, kiu ĵus antaŭ semajnoj revenis el la rusa militkaptitejo.

Tiu junulo estas mia nevo, tiom pli tio konsternis min, ĉar kiel etulon mi jam lin konis, kaj neniam mi atendintus de li tiel kortuŝan senton de justeco, spertita ĉe la unuaj kristanoj.

Li urbenvenis de l'kampo, en 1914, kamparanfilo luktanta por ia pli bona, pli sublima estonto, tajlorlernanto en ĉi urbaĉo, kaj li ne tajloriĝis ĉar li devis soldatiĝi. Tro juna li estis, ricevis plumpajn ŝuaĉojn, sur la delikata kapo li portis traŝvititan soldatan ĉapegon, larĝa, por korpulentuloj pretigita uniformo lozis sur li. El la manikoj ruĝe kaj malpure elpendis liaj, maldikaj, kvalit-tajloraj manoj kaj li estis malĝoja kaj timema, kaj lian timeman malĝojon ĝojigis nur la ioma kamparana koketemo portita dehejme. Ĝin kunportas de la hejmo hungara knabo, kiel rezervkapitalon por la personeco. Nek religian konvinkiĝon, nek socian mondkoncepton, nek homan solidarecon li kunportas, sed fieregan memfidon de sia personeco, de la izoleco de l' hungararo. La hungara knabo scias, ke neniu helpos lin, nek en la bono, nek en la malbono. De li ĉiu ĉiam nur forprenos ion. Tiel ni kreskis ĝis hungariĝi, ĝis iĝi hungaraj servutuloj, dum tiom da jarcentoj, ĝum tiu fama jarmilo, tamen, jen la hungara knabo, li vivas kaj savas sin eĉ el la infero. Tiom instruas al li la patro, per tiom forpermesas lin la patrino: filo mia, gardu vin. Jenaj vortoj enhavas ĉion. Kaj la hungara kamparanfileto gardas sin. Jam kiel sesjarulo li estas konsciiĝanta kaj serioza, li scias, ke ĉiuflanke ĉirkaŭas lin malamikoj, li scias, ke neniam, en neniaj cirkonstancoj, al neniu sin povas direkti por helpo. Sekve, li mem gardas sin mem. Li forŝiriĝas de patro, patrino, jam apenaŭ scias pri la avo, ties gepatrojn neniel li konas, nek laŭ nomo. Li staras kaj vivas sola en ĉi vivo: kiam juna, kun levita kapo, se jam maljuna, fleksite kaj kaduke pro laboro; sed ĉiam, kvazaŭ memsoleca lignero en la polvo.

Mi rigardis, rigardadis ĉi tiun mian frateton, kiu nun reĵetiĝis hejmen, post pli ol kvar jaroj.

Iom li fortikiĝis, malmoliĝis, li estas nun ĉirkaŭ dudekkvinjara.Beltalia, ŝika hometo, la okuloj belaj, seriozaj.

Rektadorse li sidas kaj ne scivolemas.

Maturulo. Preta homo. Similanta prisemitan teron, plenan je semoj, ĝermantaj, fermentantaj, kreskiĝantaj en ĝi.

– La rusoj estas bonkoraj, fratamaj – diras li mallaŭte, serioze –, eĉ paneron, se ili havas ĝin, li dividas kun la kompatinda militkaptito.

Mi pensis pri la rusaj militkaptitoj, pri la brunaj rusoj, disdonitaj por la hungaraj vilaĝoj, kiuj dikiĝintaj kaj bonanimaj vivadis ĉi tie, en la hungara Granda Ebenaĵo. La virinoj honoris la laboremulojn, nutris ilin, ekestis eĉ konkuro, kies militkaptito estas pli brava, pli dika. Sed ĉi tiu knabo kvazaŭ pri mistika fremda raso parolas pri la rusoj, pri ia malrespektata, malestimata raso, de kiu neniu ion atendis, dume la niaj ĉi tie, hejme, konsideris la unuopajn rusojn kompatindaj tristuloj, kiuj konsternas nin per sia pacienco, trankvilo, bonemo.

Nun, en ĉi tiu hungara junuleto, kvazaŭ peza odoro, ia narkota kaj ebriiga alkutimiĝo, disvastiĝas vere la animo de l' rusa raso, ĝuste tiu de la granda rusa nacio de verkistoj kiel Dostojevskij, Tolstoj, Gogol kaj Gorkij, la animo de l' rusoj de la senfina Volga-pejzaĝo, de la *muĵikoj.*

– Kiam mi foriris, ili ploris, la rusaj homoj, Gusztáv, Gusztáv, ne foriru, ĉar ni tiom alkutimiĝis al vi, ke vi estis tiom bona nia najbaro, ni plu ne havos tiom bonan najbaron, se vi foriras. Ili ploris, estis vere bravaj homoj, mi povas diri pri la rusa popolo nenion malbonan.

Kion diras rusoj pri hungaroj? La foririntoj pri la ĉi tie restintoj?

Mi vidas la hungarajn virinojn kaj virojn, kiuj forpermesis siajn rusajn militkaptitojn. Kun supereco de onklo, kun patrineco de onklino ili donis al la foriranto pansakon por la vojo, frapetadis liajn ŝultrojn, iom joviale kaj ŝerce premis liajn manojn kaj tiel forpermesis la militkaptiton, bedaŭrantaj la perdon de laboremulo, de nepagita servisto. Ili tamen ne ploris kune kun li kaj ne priploris lin. Ne priploris lin la dommastrino, kiu nutris lin abundege, manĝu nur tiu povra kompatindulo, nek lia proletofrato priploris lin, ĉar ĉi tiu iom ĵaluzis, ke la malpretendema ruso subigis kaj lasis resti sube la tagsalajron.

Ŝajnas ke la rusa vivo, la rusaj cirkonstancoj devas esti aliaj ĉe la radiko. Mi ne komprenas, tute ne, kien malaperis el tiu knabo la hungara aroganteco, la hungara senbrido de la personeco, la hungara siblado de l' temperamento. Mi demandas lin, kio pleje influas la homojn, ĉu la kaptiteco, ĉu la mizero, aŭ la boneco de la rusa popolo? Ĉu kapablas la hungaroj tie, fore, bone trakti unu la alian? Esti solidaraj, labori kune? Kompati kaj ami unu la alian? Ĉu ili kapablas tion, kion ĉihejme ili malkapablas?

– Miaopinie – diras li mallaŭtvorte, sidanta rekte kvazaŭ poplo – kiŭ antaŭe malbontraktis sian homfraton, estis instruita de la kaptiteco, ĉar mi ne kapablas malbonsente pensi pri mia homfrato. Mi estis kaptito, eĉ malsana, suferis multe. Venis al mi judo, blankan panon kaj lakton li aĉetis por mi, kaj sidiĝis apud mi por konversacii, tiel li flegis min. Kaj ni, hungaroj ĉiuj estis kune kaj rakontis reciproke la suferojn kaj ni amis unu la alian. Pedikaplenaj ni estis, ne gravas, kaj ĉiuj estis bonaj. Ni eĉ ne ĝisvivus sen la fuĝintoj el Galicio, kiuj donis panon al la suferantaj kaptitoj, ĉar

ili vidis, ke sen tio eble ni pereus. Homan senton havas nur tiu, kiu nenion havas. Kaj kiam ni malsatis kaj malfortis, ni stariĝis apud la vagonaro kaj rigardis ĝin, kaj la vojaĝantoj elrigardis tra la fenestroj kaj ĵetis por la povraj kaptitoj kelkajn kopekojn, kaj tiel ni povis aĉeti por ni ion. Nun venas la vera epoko de Kristo. La homoj komprenos la suferantojn kaj ili fariĝos egalaj. Alvenos la nova vivo, ĝi alvenos. Tiu ĉi malnova iom post iom formortos, kaj alvenos la nova epoko. Ni jam faris bilancon kun la vivo, ni devas konsideri tion, kio estas bona por niaj filoj, kaj ne por ni mem. Ĉar mi multe suferis; mi suferis multe, sed kiu povas diri, kial mi trasuferis tion: por ke la homoj de l' estonto jam ne suferu tiom, kiom ni suferis.

Poste li diris:

– Estas nun, kiam oni devas fari justecon . . . nur la justecon oni devas scii, tiam ekzistas ankaŭ la leĝo . . . Tiel mi pensas, ke, en kiu estas boneco, tiu trovas la justecon, kaj kiu scias la justecon, tiu, mi pensas, scias la leĝon . . .

En silento ni sidis, ĉar mi surpaperigis liajn vortojn, vorton post vorto, per krajono, kaj li tion ne atentis, eĉ ne vidis, li vivis interna kaj internen li rigardis, kaj poste li diris: lante kaj saĝe kaj mallaŭte diris:

– Nur la boneco helpas ĉi tie . . .

Mi ĵetis al li rigardon: patriarkon li memorigis, nomadan maljunulon de la Krimeaj dezertoj: ĉi tio estis denove ĝisoste hungara kaj praa. Ĉi juna knabo, apenaŭ dudekkvin jara, matureĝis en la militkaptitejo ĝis fariĝi maljunulo, li ekhavis saĝon kaj alportis en la hungaran mondon ian sanktan kaj grandan kaj eternan valoron.

Tradukis: *Zsuzsa Varga-Haszonits*

BAZA LITERATURA KRESTOMATIO
Ĵus aperis!

124 verkoj aŭ fragmentoj de verkoj de 54 Esperantaj aŭtoroj kaj tradukistoj. Redaktis. Vilmos Benczik. 252 p., 19 cm. Prezo: 13,80 ned. gld.
Baza libro por ĉiuj esperantistoj!

Tri verkoj de Móricz

Okaze de la 100-jara datreveno de l' naskiĝo de la talenta hungara verkisto-realisto Zsigmond *Móricz*, Hungara Esperanto-Asocio eldonas tri liajn verkojn: „Varmega kamparo", „Ĉiela birdo" kaj „Malriĉaj homoj".

La romano „Varmega kamparo" aperis fine de la dudekaj jaroj (1929), dum unu el la plej signifaj periodoj en la kreado de Móricz. Tiu ĉi romano estas reala spegulo de la akraj socialaj problemoj, karakterizaj por la 20-a jarcento en Hungario.

La agado de la romano disvolviĝas en malgranda provinca urbo, kie la vivo ŝajnas trankvila kaj enua. Sed tio estas nur momenta impreso. Sekvas mistera mortigo, komplika intrigo . . . kaj ĉiuj atributoj de la klasika detektiva romano, sed „Varmega kamparo" ne apartenas al tiu simpla ĝenro. La aŭtoro nur sperte uzis tiun formon por povi pli profunde rigardi en la degraditajn animojn de siaj herooj, kiuj formis la meznobelaran tavolon en la hungara provinco.

Ili estis homoj sen celoj, sen perspektivoj en la vivo, kun palaj egoistaj pensoj. Móricz estas talenta majstro de la vivaj kaj realaj karakteroj.

Inter la herooj reliefiĝas la figuro de Laci Avary. Li aperas por tre mallonga tempo antaŭ la legantoj kaj post lia mistera morto la aliaj herooj per siaj paroladoj detale karakterizas lin.

Gravan rolon ne nur por la agado de la romano, sed por la pli plena karakterizo de la aliaj herooj ludas ankaŭ la figuro de Vilma, la edzino de Laci Avary. Vilma estas en la centro de la terura evento.

La karakteriza trajto de stilo de „Varmega kamparo" estas la precizeco. Móricz preferas mallongajn karakterizojn, uzante nur kelkajn trafajn frazojn. Liaj komparoj estas tre reliefaj.

„Varmega kamparo" estas reala panoramo de la socio, kies membroj estas kondamnitaj al malapero. Ĉiu vorto, ĉiu detalo montras kiel profunde Móricz konis la radikojn de tiu socio.

Malriĉaj homoj estas represaĵo el *Hungara Antologio*. Móricz prezentas en tiu ĉi rakonto libertempantan soldaton, kiu fridsange rabmurdas najbaran familion: kiam oni arestas lin, li fakte ne komprenas, kio estis lia krimo, ja en la tranĉeoj mortigo estis heroaĵo.

Ĉiela birdo estas 60-paĝa rakonto, en kiu aperas la vivo de la hungara vilaĝo dum la unua mondmilito. La konflikto evoluas en am-triangulo, inter riĉa nejuna kamparano, lia malriĉa, juna edzino kaj pli frua amanto de la juna edzino. Móricz utiligas la amhistorion por demonstri la socian streĉitecon inter diversaj tavoloj de la kamparanaro.

Ĉiela birdo (tradukita de d-ro István *Nagy*) kaj *Malriĉaj homoj* (tradukita de Karlo *Bodó*) aperos antaŭ la somero, dum *Varmega kamparo* (tradukita de d-ro István *Nagy*) eliros nur aŭtune.

Georgi *Mihalkov*

La stipendio

– Li estas la mia, estimata sinjoro, ĉar lia patro mortis pro malsano, kiun li kunportis el la milito. Li estis mia filo. Poste, kiam li mortis, la tri infanoj restis al mi. Precipe post kiam ankaŭ mia bofilino mortis, tiuj tri infanoj restis tute sole por mi. Mi nutras ilin, mi zorgas ilin, mi pagas la punon pro ili, se ili ne povas viziti la lernejon, ĉar ni loĝas malproksime, kaj vintre, se mankas bonaj botoj, ili ne povas iri en la lernejon, kaj poste oni punas min pro ili.

– Nu, estas bone, tio ne gravas. Pro Johaĉjo oni neniam punis vin, eĉ li ricevis en kristnaskfestoj ĉiam novajn botojn. Ĉu mi pravas?

La maljunulo silentis: oni nun volas de li trompakiri lian proprajon.

– Sed per tio li ankoraŭ ne estas pripagita li diris.

– Nu, ni ne marĉandu – diris la instruisto. – Nun tia bonsanĉo trafos la infanon, ke neniam vi povos ĝin kompensi. Ni forportos la infanon en kolegion.

– Nu, tio ankoraŭ ne estas certa – diris la maljunulo.

– Kial ĝi estas ne certa?

– Tiu infano ne havas konvenan vestajon.

– Ne gravas, – diris la instruisto, – mi ŝatas tiun infanon tiel, ke mi entreprenos kolekti donacojn ĉe la bonhavaj loĝantoj de la vilaĝo, kaj ni vestos lin, ankaŭ la vojaĝkoston ni pagos, mi mem akompanos lin kaj aranĝos ĉion. Mi estas feliĉa, ke mi povos porti al la kolegio tian genian knabeton.

– Sed kial sinjoro instruisto volas, ke tiu infano fariĝu sinjoro?

– Ĉar li estas destinita por tio. Dio benis lin per escepta menso. Ne licas, ke tiu malgranda talentulo perdiĝu en la koto. Nu. Do, ĉu estas en ordo?

La maljunulo silentis.

– La infano estas la mia – li diris serioze. – Li estas lerta knabo, jam mi povas bone utiligi lin en la mastrumado. Vere li estas tre utiligebla malgranda knabo. Jam li direktas la ĉevalon, kiel malgranda mastro. Printempe li jam plugis, kaj turnis la plugilon tiel bone kaj brave. Kaj li ne plu devos viziti lernejon, li povos labori.

– Kion vi volas per tio? – diris impete la instruisto. – Ĉu vi ne ĝojas, ke via nepo fariĝos sinjoro?

– Mi ĝojas, mia estimata sinjoro, nur mi deziras scii, kion mi ricevos pro tio?

– Kion vi ricevus?

– Ĉar per li la sinjoroj tre profitos. Tre brava knabo li estas. Ĉar se mi transdonus lin, la sinjoroj ricevus tre konvenan, bravan infanon . . . Sed transdoni tian diligentan, laboreman, lertan knabon? Ja ĝi estas granda afero.

– Do, kiel vi pensas?

– Ĉar, estimata sinjoro, la infano estas la mia. Neniu rajtas forpreni lin de mi, eĉ ne la leĝo . . . Se oni forportos lin de mi, ĝuste kiam mi povus utiligi lin, kio okazos tiam al mi? . . .

La instruisto mirege aŭskultis la maljunan kamparanon. Sed tiu daŭrigis: – Ĉar ĝis nun mi ne profitis el li,

VILAĜO **Novaĵo de la Nacia Teatro: tri teatraĵoj de Zsigmond Móricz**
Afiŝo de József Rippl-Rónai

– Senpage, sinjoro, mi ne transdonos lin . . . Sed, se oni pagos mian malprofiton, mi ne rifuzos.

Kiel barbara homkomercisto, kiu forvendas sian infanon sklavo.

– Kion vi volas ricevi pro li?

– Donu al mi, estimata sinjoro, la sinjoroj, alian malgrandan ĉevaldirektiston anstataŭ li. Poste, dum la knabo estos for, ĉiam samaĝulon anstataŭ li, kiu povos fari lian laboron.

– La instruisto rezignis. – Tio ne eblas, maljunulo.

– Sed alie ne okazos negoco . . . La sinjoroj forprenas nian monon, nian agron, eĉ ankaŭ la aeron, kaj nun ankaŭ la plej valorajn el niaj infanoj? . . . Ĉar ankaŭ vi ne bezonas tiun, kiu ne valoras. Ankaŭ vi nur elektadas la plej bonajn . . . Do, se oni volas plimultigi la sinjoran klason, pagu . . .

li estis malgranda, li devis viziti lernejon, sed nun tiu ĉi afero estas tia, ke ankaŭ mia koro ploras pro ĝi. Ke oni forportos lin, kiam li jam estus valora.

– Do kion vi volas?

– Oni fordungas lin disde mi . . . por esti sinjoro . . . kiu rekompencos min pro mia malprofito?

Kaj li rigardis – obstin-kredante sian pravon – kontraŭ la instruisto, kiu por sia profito, kiel reprezentanto de la sinjora klaso, volas forrabi lian proprajon.

Kaj la instruisto ne povis luktvenki tiun kristalpuran rezonadon.

Tradukis: János *Sárközi* (1933)

La justo de la nevenkebla imperiestro

La janiĉaro ridante eltiris de ĉe sia felĉapo la lignokuleron, enmetis ĝin en la lakton, kaj kirladis ĝin.

– Estas bona la lakto, kial vi kirladas ĝin – diris la virino kolere.

La soldato lekis la kuleron kaj diris ion turke, je kio la aliaj malbelegaj ruĝe vestitaj friponoj komencis ridaĉi.

La virino kolere palpebrumis al ili.

– Vi ne havas monon, vi, de hundo naskiĝinta turko, nur por mono mi donas ĝin al vi.

Kvazaŭ la janiĉaro estus kompreninta ŝin:

– Monnon – li diris kaj ekfrapis la flankon de sia kaftano – monnon.

– Donu ĝin al mi – respondis la virino.

– Donnu ĝinn al mi – diris la janiĉaro kaj levis la trinkpoteton.

– Jesuomaria – vekriis la virino kaj malesperiĝinte rigardis, kiel la turko trinkas la multekostan, bonan lakton, kaj kio estos pri siaj kvin denaroj?

Ŝi volus bategi la ventron de la aĉulo, sed se li diris al ŝi, ke li havas monon, eble li pagos ĝian prezon.

Do ŝi rigardis kiel la janiĉaro trinkis per grandaj glutoj la lakton, kiun la bienmastro disdonis inter ili, inter la malriĉaj servutilinoj, ĉar estis pertambure anoncite, ke la bovinoj certe estos forportitaj. Estas vere, ke oni aĉetos ilin por mono, je bona prezo, laŭ la anonco por 12 forintoj, ili eĉ pertrumpete publikis tion, sed la forintojn ne eblas melki . . . Kaj tamen ŝi prefere portis en la tendaron la trinkpoteton da lakto, anstataŭ doni ĝin al la infanoj, ĉar oni anoncis 5 denarojn por la lakto, kaj por 5 denaroj ŝi povos aĉeti ledon, el tiu farigi sandalojn por si kaj ankaŭ por la du infanoj, aŭ aĉeti tukon aŭ salon . . .

Ĉio ĉi terure trakuris en ŝia kapo, dume la turko trinkaĉis la tutan trinkpoteton da lakto.

– Donnu ĝinn al mi – ripetis la janiĉaro la aŭditajn vortojn kaj li redonis la trinkpoteton.

– Donu al mi mian monon – kriis la virino, donu al mi mian monon!

Parado de janiĉaroj

– Monnon – ridis la soldato kaj nun li ekfrapis sian glavon – kaj ne sian kaftanon, samtempe etendante manon por kiso.

Li kunrigardis kun la aliaj, kiuj tiel ridegis, ke ili preskaŭ sufokiĝis pro la bona ŝerco, poste li turnis sin por promeni for.

Sed la sango ekboliĝis en la virino:

– Hej, ci trifoje tranĉitan vizaĝaĉon havanta porko – ŝi kriis kaj kraĉis sur lian manon – ci forŝteliĝas kun mia lakto, sufokiĝu pro ĝi, kaj la kvin denaroj? Miaj sandalo kaj tuko kaj la salo . . .

Pluvegis la blasfemoj sur la janiĉaron, kiu iom da tempo toleris ĉion, sed poste li frapis la kolon de la virino kaj fiere, ridaĉante foriris.

Iom pli malproksime estis ĉaristoj, kiuj laŭ la ordono kaj la pertambura anonco portis panon, tritikon, kortbirdojn el la vilaĝo. Ili iĝis maltrankvilaj, ĉar konjektis, kio okazis.

– Onjo Marja – ili kriis – kio estas al vi, – onja Marja?

– Ve, tiu inferido portas mian monon, li portas miajn kvin denarojn – ŝrikis onjo Marja kaj furioze kuris post la eskapinta janiĉaro.

La vilaĝanoj malserene interrigardis, eĉ ilia dorso frostotremis, ankaŭ ili antaŭsentis la okazontan malbonon. Nu, oni tre bone scias, kion signifas tia anonco, ke ili elpagos ĉion. Nur tiu onjo ne perdu sian kapon, eble eĉ komenciĝos interbatado, kaj tiam okazos tre facile ankaŭ kelkaj pikoj.

– Silentu, kara onjo – oni kriadis al ŝi kaj timigite rigardis la senfinan grandan aron. Kvazaŭ jam ĉiu priatentus ŝin.

Sed onjo Marja ne lasis la aferon tiel; ŝia voĉo estis tia, kiel tiu de la kupra trompeto kaj el ŝia buŝo hajlis sakraĵoj. La turkoj kun granda trankvilo ĉirkaŭis kaj seriozmiene aŭskultis ŝin, kaj fine la onjo staris meze de amaso, ŝi povis iri nek antaŭen, nek malantaŭen kaj la janiĉaro malaperis. La onjo nur veadis kaj vidante, ke neniu insultas ŝin, ŝi eĉ pli laŭte furiozis kvazaŭ ŝi havus epilepsion.

Abrupte la amaso disiĝis en du partojn kaj oni kriadis turke; nur pli malfrue komprenis onjo Marja, ke oni kriis: *padišaho*.

Sur grandaj ĉevaloj venis eminentaj turkaj paŝaoj, jen – pensis onjo – nun estas tempo paroli pri la denaroj.

Ŝi terenĵetis sin kaj plengorge kriis:

– Juston donu miaj potencegaj altmoŝtoj!

La rajdantoj haltis.

Unu el la paŝaoj venis pli proksimen al ŝi kaj demandis hungare:

– Kio estas al vi, bona virino?

La onjo ekĝojis aŭdante la hungarajn vortojn.

– Vidu, mia animo, mia anĝelo, – ŝi kriis – hundkapa janiĉaro trinkis mian lakton, kaj pafis sin for kun miaj kvin denaroj.

La paŝao turke klarigis al malgranda maljunulo, kiu silente, senmove sidis sur granda nigra ĉevalo.

– Ĉu vi ekkonas tiun janiĉaron?

– Jes, el cent, el mil, eĉ en la horo de mia morto.

Jam oni blovis la kornojn, la trumpetojn de la janiĉaroj kaj kuregis la ruĝaj ekzekutistoj kun la lignokulero en sia felĉapo.

Malproksime la soldataro enviciĝis en kvarangula formo kaj rigidiĝe rigardis, kiel donas juston la sultano, vespere sur la ebenaĵo.

– Serĉu lin! – kaj la paŝao almontris la vicon de la janiĉaroj.

Onjo Marja ekiris kaj per siaj malgrandaj, nigraj okuloj ŝi trakuris la ruĝajn egulojn.

– Ĉi tie estas la trifoje tranĉitan vizaĝaĉon havanta – ŝi ĵetis krion.

La janiĉaro antaŭenpaŝis.

– Ĉu vi estas certa pri li?

– Kompreneble, mia anĝelo, eĉ mia korbatado haltis, ekvidinte tiun kanajlon.

– Ĉu vi trinkis la lakton de ĉi tiu virino? – diris la paŝao.

La janiĉaro donis al si kalkulon pri la batado, frapado kaj diris:

– Ne.

Onjo Marja levis siajn manojn kontraŭ la ĉielo.

– Neniu kredu iam al vi, estu la ŝtelisto de la mondo pro miaj kvin denaroj.

– Ĉu vi trinkis la lakton? – demandis denove la paŝao.

– Ne.

Onjo Marja denove eligis krion.

– Vi centmilope venis por forpreni kvin denarojn de malriĉa virino.

La paŝao decide demandis ankaŭ la trian fojon:

– Ĉu vi trinkis la lakton de la virino?

Kaj la soldato la trian fojon respondis: ne.

Tiam sur la granda ĉevalo sidanta malgranda maljunulo movetis sian skurĝeton de sube supren kaj la paŝao ekvoĉis:

– Tranĉu lian ventron!

Onjo nur tiam konsciiĝis, kiam oni deŝiris la kaftanon de la janiĉaro kaj levis la glavegon.

– Ve, Sinjoro Jesuo – ŝi kriis – ho, ne mortigu lin pro tio. Mi ne volas lian morton.

La paŝao mansignis kaj oni tratranĉis la janiĉaron.

Kun la sango la lakto elfluis el liaj intestoj.

Tiam la paŝao diris al la svenanta virino:

– Se la lakto ne estus en li, nun via gorĝo estus tratranĉita, ĉar vi aŭdacis diri malbonon per via malpura buŝo pri la heroo de la nevenkebla imperiestro.

Poste li levis sian vipon.

– Donu al ŝi la kvin denarojn.

Tiam li rajdis antaŭen kaj turke, hungare kriis:

– Alaho estas granda kaj Mahometo estas lia profeto . . . Heroldu ĉiuloke la juston de la nevenkebla imperiestro.

Onjo Marja sentante kapturniĝon, teruriĝe ĉirkaŭita de sveno, stumbladis flanken el la vojo de la ĉevaloj.

Ŝi premadis en sia manplato la kvin denarojn kaj decidis aĉeti kvin futojn da tolo, kiu estos iam uzebla ankaŭ por mortuko, ĝi estus bona ankaŭ por la kompatinda soldato . . . Nur almenaŭ la sultano estus doninta kvin ormonojn pro tia granda ektimo . . .

Tradukis: D-ro István *Nagy*

Mauro Nervi

BALADO

Menestreloj ludas
frostajn liutojn.

Velkas ore
la mola krokuso,
inter la fridaj silaboj
de la luna surfaco;
kaj kaptas vin plej nova deliro,
antikvaj versoj surdas
en la nokto seneĥa.

Kaj kuras brue via juna korpo
sur la folioj de padoj pratempaj,
kaj ĉirkaŭ vi
tremas glaciaj arbaroj,

daŭre frenezas
la ritma balado.

Endre Ady:

Kvazaŭ letero al Zsigmond Móricz

Kiel arĉ' farita el rozujo-branĉo
al kordo sonora frotiĝas per tanĝo,
frotiĝu karese laŭ sammaniero
al sinjoro Zsigmond Móricz ĉi letero.
Sendant' buŝe volis peri ĝin laŭ eblo,
sed li nun malsanas pro la Vivo-febro.
Tamen, ĉar ankoraŭ multaj kredas al mi,
transdonu do iu ĉi leteron far mi.
Benatu peranta voĉo la plorema,
same l' ricevonton trafu beno plena.

Ŝatata amiko, Zsigmond dikstatura,
vi scias, ke diro estas polvo nura,
pro tio per versoj mi nun al vi iras,
en Mi-ĝenraj versoj oni ne babilas.
En malsano, tristo estas la vizito,
en bone ekinta, perdita milito,
kun ĉiel' printempa estas mia veno,
kun eta riproĉo, eta enviemo.

Startinta malfrue, estas vi feliĉa,
ĉiu via semo estos fruktoriĉa,
ne trafos vin malbeno, hungara, aĉa,
tardo via estas: hungareco saĝa.
Kaj tamen hastis vi, estis surportanta
ŝarĝon de noveca kred' hungara, sankta,
fiere, kun edzin', infano, atendoj,
kun multaj ekantaj nove pra-inventoj.
Kaj se foje ni du pense ne konkordas,
vi fortas, ĉar en vi la animo fortas.

Krei vi kapablas kaj same kulturi,
pri tio atestas via Dani Turi[1],
sed pli bele estas tion atestanta
ĉiu bru' de via kor' triumfa, granda.
Kaj pro kio viaj vangoj estos palaj,
venos al ni pensoj viaj. Mil hungaraj
nediritaj tristoj, sekretoj sopiras,
kaj belecoj, tion, kion Móricz diras.
Ankaŭ diroj kelkaj far mi estis novaj,
sed venas fabelaj reĝ-ĉevaloj blovaj.
Forportu diablo tutan versan aron,
vivon ni deziras krudan, la realon.
Se por doni ion estas rim' senpova,
ĝin redonos nia Matyi Ludas[2] *nova.*

Olda-juna Zsiga[3], *rigarde, aŭskulte,*
aŭde kaj verkante vi donis mult-multe.
Sed dum niaj dentoj akraj, sanaj restos,
pli bela, pli bona l' aliulo estos.
Mi pensas, vi estis tiu „hom' alia",
parte nia vivo, parte morto nia,
parte nia ĝojo, parte naŭz', angoro,
do la vivon, kiu pasis jam al foro
vi reportis al ni, Zsigmond Móricz kara,
vi, ebria hungar', sobrulo madjara.

Al vi strangaj homoj sin turnas kun gapo,
ja vi estas nune la bonfara knabo,
por Okcidentanoj[4] *orienta flago,*
pruvanto granda de nia lukta ago.
Potenco hungara, foje afektanto,
Ueston sturmanta, kun kreskanta lando.
Volinta pastriĝi, sed anim', fluganta,
Biblia hom', por vi skribo estas sankta.
Vi ambasadoro de hungaroj estas,
hungaraj radikoj praaj en vi nestas,
eĉ, se vi nur ŝercus, trompe maskon ligus,
per decaj mensogoj vi ja min pravigus.

En vintro malmulta kaj ĝoja branĉaro
atendas far Móricz pri miraklofaro,
kaj plenum' ja certas, ne perditas tempo,
Móricz estas patro de frua printempo.
Tamen, li min amu, tion mi mesaĝas,
am' de tia homo al mi ege plaĉas,
ne potencegulo, sed pli ol potenco,
eĉ, se foje nocas – nura bonintenco.

Sinjor' Zsigmond Móricz estu adresito,
festata nuntempe per flor' laŭ merito.
Anstat' floroj de mi – ĉi leter saluta,
sed apud li staros mi dum vivo tuta.
Mian ĉerkkovrilon oni jam preparas,
tamen Zsigmond Móricz miaflanke staras.
Hungaraj ĵet-kuboj faris sorton tian,
ni, martiroj, trovu unu la alian,
eĉ se la Maleblon ni ne povis nei,
havis sanktan volon: belajn verkojn krei.

Tradukis: Márton Fejes

1. Ĉefrolanto de la romano Or-koto.
2. Matyi Ludas – popola heroo, verse prikantita de Mihály Fazekas. Lian poemon Móricz tralaboris por teatra apliko.
3. Karesa formo de baptonomo *Zsigmond*
4. Okcidentanoj – kunlaborantoj de literatura revuo Nyugat. La verso estas aludo pri revoluciemo de Móriez.

ĉapitroj el la historio

István Báthory, regnestro de Transilvanio (1571–1586) kaj reĝo de Pollando (1575–1586)

István Bocskai, regnestro de Transilvanio

Sigelo de Gábor Bethlen



9. LA MILITO DE DEK KVIN JAROJ

BATALOJ KONTRAŬ LA ABSOLUTISMO DE HABSBURGOJ

En la dua duono de la 16-a jarcento, István Báthory – elstara ŝtatisto kaj humanisma klerulo – paŝo post paŝo firmigis la sendependecon de Transilvanio inter Habsburgoj kaj la turka imperio. Li laboris pri tio, komence, dum la regado de Johano Sigmundo reveninta de l' ekzilo; post la morto de tiu, kiel regnestro de Transilvanio (1571–1586) li realigis pragmatisman politikon. Pere de ligoj inter Transilvanio, Pollando kaj Francio, kaj sub signo de la kontraŭ-Habsburga tendenco, Báthory realigis Eŭrop-horizontan politikon, okupante ankaŭ la tronon de Pollando.

Transilvanio senĉese evoluadis post la fortikiĝo de la regnestra potenco kaj pro la religia libereco. Dume, en la partoj de Hungario sub Habsburga potenco, la neŭroza Rudolfo (1576–1608), uzante la absolutismajn metodojn de la Habsburgoj de l' hispana branĉo, provis fleksi la rezistemon de la hungara nobelaro, kies plimulto, male al la reganta dinastio, estis protestantoj. En 1591 eksplodis milito inter la turkoj kaj Habsburgoj; ŝajne alvenis la momento por forpeli la malfortiĝintajn turkojn. La liberbataloj estis apogataj ankaŭ de Transilvanio kaj de la rumanaj princlandoj, sed la milito neatendite finiĝis per otomana venko, malgraŭ la sukcesa ofensivo de la hungara kaj imperiestra armeoj. La turkaj trupoj detruis centojn da vilaĝoj, samtempe la solduloj de l' imperiestro enkondukis metodojn de teroro en Transilvanio kaj la norda Hungario.

Pri la ĝenerala malkontento atestis la unua granda ribelo, en 1604, kontraŭ la Habsburgoj. La bienulo István Bocskai komplotis kun la turkoj kaj kolektis sub sia flago taĉmentojn de la soldatoj-hajdukoj. Baldaŭ li okupis la transan regionon de l' rivero Tisza, kaj eniris en urbon Debrecen, poste en Kassa (nun Košice). Ankaŭ anoj de la reganta klaso aliĝis al la triumfa ribelo, kaj en la asembleo de la 1605-a jaro oni elektis Bocskai-n kiel regnestron de Transilvanio.

Liaj politikaj celoj inkluzivis la neŭtraligon de la du potencoj – la Habsburga kaj tiu de la turkoj – en hungara teritorio kaj la restaŭron de la paco en la lando. Rezulte de liaj persistaj fortostreĉoj, en 1606 estis subskribita la Viena packontrakto, en kiu la imperiestro devigis sin meti punkton post la sensukcesa kontraŭturka milito, redoni la konfiskitajn terojn, garantii la religian liberecon kaj rekoni la sendependecon de Transilvanio. Sekve de tio – kaj per la perado de Bocskai – ankaŭ kun la turkoj komenciĝis traktadoj, kaj fine de la sama jaro finiĝis la milito de dekvin jaroj, dezertiginta la landon.

Post la Bocskai-ribelo, en ĉiuj provincoj akriĝis la rezisto de la hungara nobelaro kontraŭ la Habsburga imperio, kaj pro ilia premo Rudolfo devis forlasi la tronon. Anstataŭ li estis elektita Matiaso la 2-a (1608–1619), kies situacio ne estis tre firma, tial la nobelaro sukcesis eldonigi far li leĝojn, kiuj pliigis la ŝarĝojn kaj la submetiĝon de la servutuloj. Tiel, el inter la Orient-Eŭropaj landoj, ankaŭ en Hungario kreiĝis la duobla servuteco, kiu malfaciligis plu la situacion de l' kamparanaro – interalie, pere de la absoluta ligiteco al la tero.

La Habsburga politiko kaj la alianco inter la hungaraj bieneguloj enkarniĝis en la kontraŭ-reformacia movado, kies gvidanto estis Péter Pázmány, ekde 1616 episkopo de urbo Esztergom kaj elstara predikisto. Ĉi tiu eklezia potenculo – profunde kulturita, unu el la grandaj majstroj de la hungara lingvo kaj fondinto de la Universitato de Nagyszombat (nun Trnava), atingis, ke le kontraŭ-reformacia movado kunplektiĝu kun altnivela literatura aktivado. Li rekonvertis al la katolika religio aron da familioj apartenantaj al la alta nobelaro, kaj laŭ la principo „cuius regio eius religio" (kies bieno, ties religio), la konverto de l' grandsinjoroj rezultis la rekatolikiĝon de grandaj teritorioj de la lando.

de la hungara popolo

Miklós Zrínyi (1620–1664)

Gábor Bethlen, regnestro de Transilvanio

Dum en la Hungara Reĝlando fortikiĝis la Habsburga absolutismo, siavice Transilvanio, en la komencaj jardekoj de la 17-a jarcento, travivis la oran epokon de sia historio. Pro la konsekvenca ekonomia politiko de Gábor Bethlen (1613–1628) prosperis la enlandaj industrio kaj komerco. En urbo Gyulafehérvár (nun Alba Julia) fondiĝis la unua supera lernejo de Transilvanio, kaj Bethlen sendis por studi en eksterlando plurajn talentajn junulojn. Rilate la eksteran politikon, li estis kontraŭ-Habsburgema, kaj kune kun la protestantismaj potencoj li plurfoje sukcese enmiksiĝis en la bataladojn de l' milito de tridek jaroj. Lia posteulo, György Rákóczy la 1-a, (1630–1648) daŭrigis la ekonomiajn kaj sociajn reformojn de Bethlen, kaj en alianco kun Francio kaj Svedlando li gvidis sukcesan militiron kontraŭ la Habsburgoj. György Rákóczy la 2-a (1648–1660) komencis militan kampanjon por akiri la tronon de Pollando, sed lia armeo estis diserigita. En la batalo kontraŭ la turkoj penetrintaj en Transilvanion, mortis mem la regnestro. Transilvanio ruiniĝis dum ĉi tiuj bataladoj kaj la protektado de l' turkoj faris el ĝi marionetan landon, dependantan de la otomana imperio.

La libro de Péter Pázmány, ĉefepiskopo de Esztergom: „Gvidilo al la Dia vero" (1613)

Dumtempe en la hungara socio pliiĝis la malkontento kaŭze de la pasivemo de la Habsburgoj. Miklós Zrínyi (1610–1664) – verkisto, ŝtatisto kaj militestro – perhelpe de siaj verkoj kaj politika agado, klopodis realigi sian koncepton pri centrigita nacia monarkio. Zrínyi, kies praavo estis la heroa defendanto de l' fortikaĵo Szigetvár, koncentris sian politikon en la kontraŭturka batalo. En 1664, post fulmrapida ofensivo, li grave sukcesis ĉi-kampe. Tamen, la imperiestra kortego ne lin, sed generalon Montecuccoli nomis estro de la armeoj batalantaj kontraŭ la turkoj. Montecuccoli venkis la otomanojn; malgraŭ tio, la Habsburgoj subskribis kun la sultano packontrakton, kiu egalis al malvenko. Supozeble, tiu koncedo ŝuldiĝis al la prikonsidero de interesoj de la Aŭstria komerca kapitalo.

Jenaj okazintaĵoj ege seniluziigis la publikan opinion en Hungario. La movado kontraŭ la Habsburgoj, serĉanta kontaktojn kun Francio, troviĝis en eka punkto, kiam dum ĉasado Miklós Zrínyi mortis, abrupte kaj tragike. Lian politikon por la sendependeco daŭrigis palatino Ferenc Wesselényi kaj Péter Zrínyi. Sed ilia konspiro jam en la komenca fazo estis malkovrita, la gvidantoj arestitaj kaj ekzekutitaj, iliaj bienoj konfiskitaj. La imperiestra kortego eluzis la cirkonstancojn, neniigante la aŭtonomion de la hungara nobelaro, samtiel la religian liberecon de l' protestantoj.

Tr.: *VHZs*

* Jarcentoj de la hungara literaturo *

István Torda



Miniaturo el la Ilustrita Kroniko

„Se mi renkontas iun malnovan restaĵon de eksterlanda popolpoezio, mi ĉagrene demandas min ĉiam: ĉu ni havis iam originalan naivan eposon?" Granda poeto hungara, János Arany faris la supran demandon en sia studo, titolita „Nia naiva eposo" en 1860. Oni tuj devas aldoni: la scienco eĥ ĝis nun ne diris amenon pri tiu ĉi afero.

Dum la epoko de romantikismo en la tuta Eŭropo memoro pri la praaj herooj, la antikva poezio de popoloj, kiel rimedoj por pliigo de la nacia konscio, troviĝis en fokuso de la intereso. Kie ne konserviĝis praaj poeziaj memoraĵoj, tie komenciĝis diligenta klopodado por rekonstrui ilin. La finnoj sukcesis laŭ la arkaikaj kantoj, kolektitaj inter la popolo, krei sian eposon Kalevala.

La hungara folkloro ne konservis similajn epikajn kantojn, tiamaniere oni povis konfesigi nur la latinlingvajn kronikojn el la 13–14-a jarcentoj. Dum la lasta jarcentŝanĝo oni kun pli kaj pli malobjektiva fervoro klopodis konkludi pri la ebla plej riĉa praeposo hungara. Tiel la esplorado havanta romantikan inspiron, kompromitiĝis dank' al siaj malscienceskaj metodoj.

Laŭ la nuntempa opinio surbaze de „poeziecaj" partoj de la kronikoj eblas supozi iom pli grandan epikaĵon plej verŝajne pri la dinastiaj interluktoj de la 11-a jarcento. Ne konserviĝis skribita hungarlingva verko, sed buŝe, ĉe la profesiaj kantrakontistoj povis formiĝi kantocikloj pri la sama temo. En la t.n. *Ilustrita Kroniko* oni trovas historion de komenco de la 12-a jarcento, *Gesta Ladislai Regis*. Ĝi elstaras per siaj poeziecaj fragmentoj, per aligo de elementoj de la naiva poezio al la latina teksto.

Prefere por kuriozeco ni mencias, ke pri antikva hungara laborkanto konserviĝis aŭtentika „raporto". Ni citas la legendon (historion) de episkopo Sankta Gerhardo:

„Iam okazis, ke li por iun protekti, iris al la reĝo, kaj en la arbara parto de tiu regiono, kiu estis konvena por paŝti porkojn, situis vilaĝo, kie li tagmeze trovis tranoktejon. Meznokte li aŭdis muelil-bruon . . . Kaj tuj ekkantis la virino, movanta la muelilon. Kaj la episkopo mire diris al Walther: „Walther, ĉu vi aŭdas la kanton de la hungaroj, kiel ĝi sonas?" "

Kronikoj kaj kronikistoj

La plej grava ĝenro de la mezepoka hungara literaturo estis la latinlingva histori-verkado, floranta en la 13–14-a jarcentoj.

„Anonymus" (Anonimulo) – plej verŝajne kronikisto de la reĝo Béla (Adalberto) la 3-a – postlasis nur la unuan literon de sia nomo. „P. dictus magister" (P., dirita majstro) – tiel li sin nomas. Anonymus rakontas la historion de la hungaroj ekde ilia prapatrujo ĝis la komenco de la ŝtat-organizado. Lia ĉefa strebado estis konatigi kaj laŭdi praulojn de familioj oligarkaj, partoprenintajn en la patrujokupo. Por tio li fakte enloĝigis al la Karpat-baseno de la tempoj patrujokupaj ĉefojn hungarajn kaj iliajn laŭdirajn malamikojn.

Gesta Hungarorum fare de Simon Kézai konsideris la gentojn hungara kaj huna la sama. La historion de hunoj li devis mem krei, kaj el tio li faris logikan kaj interesan rakonton. La hungararo ĝis la 19-a jarcento ne povis liberiĝi disde la ravo de tiu ideo. Fikcio pri la mondvenkaj hunaj prauloj fariĝis bazo de la histori-koncepto nobela-naciisma.

Janus Pannonius

La *Ilustrita Kroniko*, verkita en la 60-aj jaroj de la 14-a jarcento, estas ĉefverko de la tiutempa miniatur-pentrado. Ĝia teksto rakontas la hungaran historion ekde la huna Attila ĝis la hungaraj reĝoj el la dinastio de Anĵuoj.

Janus Pannonius

La hungara humanista intelektularo akiris sian erudicion ĝenerale eksterlande. Hungaroj ekvizitis la Nord-Italiajn edukejojn ekde la 40-aj jaroj de la 15-a jarcento. La unua Hungarlanda centro de la renesanca kulturo, grandsignifa ankaŭ kompare al la Italiaj, fariĝis korto de la reĝo Matiaso Korvino-Hunyadi en la urbo Buda. Lia biblioteko, la mondfama Corvina (Bibliotheca Corviniana) konsistis el pli ol mil volumoj, kiuj enhavis trimil verkojn.

La unua granda lirikisto de la hungara literaturo, Janus Pannonius, elstara reprezentanto de la mezepoka la-

Unu el la plej belaj pecoj de la Bibliotheca Corviniana

Janus Pannonius

PRI PAPO PAŬLO

Filnjon, Paŭlo, vi havas kaj trezorojn,
kiom rare ĉe pontifik' troviĝis.
Sankta Patro – ĉi nomo ne konvenas.
Vi, pli ĝuste, beata patro estas.

AL SILVIA

Vi infanon de mi havos, diras vi, min persekutante.
Ej, Silvia eta, strange ja malpravas tiu akuz'.
Diru, ĉu vi plendos inter dornoj abundaj trairinte:
„Sangas mia kruro, ve, kaj kulpas ĝuste ĉi tiu dorn'.'

POR LA PACO

Dio, ho vi granda Estro en la ĉielo trans la steloj,
alrigardu milde nian turpan teron, kie milit'
frenezega pereigas pacon, kaj kie Mars' kuregas
glavon tintigante. Siro! Ekstermiĝas are la viv'!
Ho, ĉi teron benu, Patro; al popol' trankvilo necesas,
doloregas batalvundoj kaj tiele trista la mort'!

El la latina: K. Kalocsay

tinlingva poezio, naskiĝis en 1434 apud la renkontiĝo de la du riveroj Dráva kaj Danubo. Lia talento jam tre frue evidentiĝis, kaj lia onklo, János Vitéz, episkopo de Nagyvárad (nuntempe Oradea Mare en Rumanio) sendis lin al Ferrara, al la studejo de Guarino Veronese.

Janus rapide elstaris inter siaj kunuloj. Efektive la tradician, lernocelan praktikadon de la latinlingva versfarado li transformis tiamaniere, ke li povis ekspresi la bolantan vivon spiritan, estigitan de la granda edukisto Guarino, kaj krome la tutan atmosferon de la urbo Ferrara.

En liaj epigramoj studantoj de Guarino aperas en mil diversaj figuroj: unu el ili estas fanfaronulo, la alia humilema, la tria studadas la tutan lokon, la kvara ĉion formanĝas, la kvina estas sentalenta pri la literatura verkado. Aperas ankaŭ la bona, olda Guarino, la neevitema uzuristo kaj tiuj virinoj, kiuj ofte videblas ĉirkaŭ la studejoj.

Janus el Ferrara revenas al la feŭda Hungario, kie la renesanca kulturo nur komencis disvolviĝi. Hejme li ricevis laboron en la Kancelario de la reĝo. Li konceptas belajn leterojn, lerte argumentantajn diskut-skribaĵojn. Li verkis ankaŭ porokazajn versaĵojn, sed vere valoraj pecoj de lia Hungarlanda poezio estas ne ili, sed liaj spontaneaj elegioj, en kiuj li konfesas pri siaj malsano, suferoj, pri la morto de sia patrino, pri la inundoj, turmentantaj la landon, pri milda beleco de la Transdanuba regiono. Janus estas konsiderata la unua moderna poeto de la suferado. Ĉe li eksonas ekstazo de la febro, monstroj de sendorma nokto, naŭzo pro la malsana korpo. Tio poste dum multaj jarcentoj ne havas ekzemplon alian.

Unu fojon ankaŭ la iama satiristo ekparolis en li per majstre komponita epigramaro, kies suferanta heroo estis la papo Paŭlo la 2-a (*Quare nunc, ut quondam, summorum pontificium testiculi, non explorantur* – Kial ne estas esploritaj la testikoj de la papoj kiel antaŭe? ktp.). Tiuj pecoj merite eniris al la plej famajn antiklerikajn antologiojn. Ludwig Pastor, historiisto de la papoj, en la pasinta jarcento volis pravigi Paŭlon la 2-an pri la „maljustaj kalumnioj". Dum tio li indigne strebis refuti ankaŭ Janus-on, kiun li pensis historiisto. Se li estus sciinta, ke tiu ĉi „Historker" estis episkopo de la Katolika Eklezio! Ĉar dum la jaroj, pasigitaj Hungarlande, Janus Pannonius ricevis eminentajn eklezi-ajn postenojn. En 1460 li fariĝis episkopo en la urbo Pécs (Peĉ). En la jaro 1466 li grave ekmalsanis, kaj tiu malsano turmentis lin ĝismorte. Lian organismon dum kelkaj jaroj mortigis la tuberkulozo.

Kiam li fariĝis malakceptanto de la politiko de reĝo Matiaso? Oni ne scias tion tutcerte. Sed estas fakto, ke la poeto iĝis gvidanto de komploto kontraŭ la reĝo.

En 1472 li devis eskapi al Italio. Dumvoje li mortis apud Zagrebo, en Medvevár la 27-an de marto 1472.

Pri konservado de lia memoro zorgis lia iama mecenato, fariĝinta poste lia kontraŭulo: reĝo Matiaso.

Versojn de Janus li kolektigis en unu volumo, kiu estis lokigita en la fama *Bibliotheca Corviniana.*

Tradukis: *R. P. A.*

Malgrandaj eklezioj en Hungario

Preĝejo de Pentekosta Evangelia Komununo en Budapeŝto

Ĉu ekzistas en Hungarlando etaj eklezioj, sektoj? Ĉu kredantoj, ne apartenantaj al la grandaj, historiaj eklezioj, povas praktiki sian religion? – tiajn demandojn ricevis foje nia redakcio, kaj ilin ni respondis laŭ niaj modestaj konoj. Tamen post la lasta tia demando ni decidis pli profunde „esplori" tiun flankon de la religia vivo, por doni abundan informon, eventuale per aparta artikolo. Ni sukcesis ekscii vere interesajn – ankaŭ de ni nekonatajn – aferojn pri la situacio de la ne-grandaj eklezioj, precipe helpe de ekleziuloj, pastoroj. Jen, ni prezentas skize la rezultojn de nia enketo: ĉe la komenco neeviteble devas stari la multe plendita, amara *pasinto*.

El la rememoroj de pastoroj de etaj eklezioj reliefiĝis la multspecaj sufer , la subpremoj kaj mizeroj, travivitaj dum la epoko de la grandbienoj, antaŭ 1945. Tiutempe nur la grandaj, historiaj eklezioj havis leĝan aprobon de la ŝtato; la nove formiĝintaj konfesioj, religiaj komunumoj kun siaj malmultaj kredantoj restis diksriminaciataj, sen ŝtata rekono. La opozicia apartigo de la „aprobitaj" eklezioj motivis la daŭran persekutadon, plejparte kontraŭ malriĉaj kamparanoj, vilaĝanoj. La ŝtataj aŭtoritatoj foje toleris la diservojn de kelkaj, ekzemple de baptistoj, sed plejparte oni subigis ilin – i.a. la adventistojn – al *polica kontrolo*, kaj senindulge malhelpis ilian religian vivon. Ofte ĝendarmoj disigis publikon de diservoj; la sorto de predikantoj, pastoroj variis de minacoj ĝis arestadoj, ĉar la ne-permesitaj sektoj povis ekzisti nur kaŝe. Kompreneble mankis eblo posedi preĝejojn, sidejojn, la komunumojn akceptis por diservoj ĝenerale privataj loĝejoj.

Sur tiu, jam historia fono iĝas pli klara la plene ŝanĝiĝinta situacio de la nuntempo. Post la liberiĝo, en 1947 nova, demokratia leĝo deklaris *samrajtaj* ĉiujn religiojn en la lando. Estis likvidita ĉia eklezia privilegio, kiuj ĝeneralaĵ premis grave la etajn eklezioj en la provincaj regionoj. Realiĝis la malnova deziro, la disduigo de eklezio kaj ŝtato. Finiĝis la iama, sufoka diskriminado – kaj por individuoj, kaj por eklezioj. La Konstitucio de Hungario proklamis la liberecon de konscienco, kaj same certigis la *religian liberecon*.

Post ĉio ĉi malfermiĝis tute novaj ebloj antaŭ la etaj religioj. Oni povis krei konvenajn organizojn, flegi la religian vivon, eduki pastrojn. Antaŭ 30 jaroj la registaro ligis formalan interkonsenton kun la grandaj eklezioj, kiu multflanke reguligis la aferojn kaj rilatojn inter ambaŭ flankoj. Ties spiriton kaj normojn plene akceptis ankaŭ la etaj eklezioj, ĉar gravaj avantaĝoj rezultis por ili el la nova eklezia politiko. Temas pri la komune akceptitaj *principoj*, kaj sur tiuj baziĝas nuntempe la bonaj rilatoj inter la etaj religioj kaj la ŝtato. „Niaj zorgoj estas konfide aŭskultitaj ĉe la registara oficejo de ŝtatsekretario – speciala por religiaj aferoj –, niaj petoj laŭeble plenumitaj, kaj se troviĝas ia problemo, komune ni solvas ĝin pere de trankvilaj traktadoj, laŭ la komune fiksitaj principoj" – diris baptista pastoro, prezidanto de la tn. *Konsilio de Liberaj Eklezioj*.

Tiu konsilio estas kuniĝo de la etaj konfesioj: baptistoj, adventistoj, metodistoj, pentekostanoj, prakristanoj, liberkristanoj, kaj pluraj aliaj. Ĝi servas – ni diru – kvazaŭ ilia „sindikato", ankaŭ por reciproka helpo inter si, ofte necesa pro la ope malgranda kredularo. „Kiu povas vidi, vidu!", jen, inter ili ĉesis la iam oftaj kvereloj, la socialisma etoso alradiis el tiu medio tiel, ke ili nun pace kunekzistas, sen konfliktoj.

Sub egido de la Konsilio estas organizataj konstruadoj de modernaj preĝejoj, rezidejoj, pastoro-logejoj, anstataŭigantaj multajn mizerajn dometojn de la pasinta epoko. Komune oni havas jam feridomojn (apud Balatono), maljunulejojn; ekzistas vasta libroeldonado (inter alie de kantlibroj, muziknotoj), pastrolernejoj (seminario), kursoj pri eklezia muziko kaj por aktivistoj, kaj diversaj, komune efektivigeblaj aferoj. Mono – videble – ne mankas: pere de libera kontribuo fare de la kredantoj al siaj komunumoj, la eklezioj aparte financas sin, respektive la komunajn aferojn menciitajn. Sekve de tio la etaj eklezioj ne bezonas monhelpon de la ŝtato, kio estas ja necesa por la ne tiom fortan internan vivon havantaj grandaj eklezioj. Laŭdire ankaŭ la religia vivo en tiuj eklezioj estas pli firme organizita, kun pli da interna kohereco, ol ĉe la protestantaj eklezioj. Pro tio jam videblas sufiĉe klare, ke salajroj de pastoroj, aĉeto de areoj, domoj, la konstruad-kostoj laŭbezone kolektiĝas en tiaj vilaĝoj, kie iam regis senespera mizero.

La Konsilio siaflanke konsistigas parton de la Hungarlanda Ekumena Konsilio, en kies kadro farita kunlaboro estis i.a. la moderna tradukado de la tuta Biblio. Kun la internaciaj baptistaj, metodistaj, k.s. organizoj ĉiuj hungaraj eklezioj havas sian propran interrilaton, do ekster la Konsilio. Estas fiere menciata flanke de la hungaraj pastoroj, ke plurajn el ili elektis alta estrarano sia internacia eklezia organizo, respekte pro iliaj valoraj kontribuoj al la religia vivo. Cetere, el tiuj mondaj estraroj ofte venas vizitantoj al Hungario por vidi ĉi tie la ekzistadon de la hungaraj ekleziaj komunumoj. Ili foriras kontente, laŭ iliaj deklaroj jen en nia lando, jen en eksterlandaj mondkunvenoj, kie ĉiam aperas hungaraj delegitaroj, ne malofte kune kun hungaraj ekleziaj ĥoroj.

Pro kelkaj demandoj venintaj al nia redakcio, ni interesiĝis ankaŭ pri la konfesioj, kies kredo ne permesas preni armilon. La nazarenoj iam suferis malliberejon, kiam ili – dum la deviga soldatservo de junuloj – rifuzis la armilojn, krome ankaŭ la kutiman soldat-ĵuron. La hungara ŝtato – por eviti konscienc-konfliktojn – akceptas de ili anstataŭ ĵuron solenan promes-deklaron, kaj vokas tiujn junulojn nur al *senarmilaj* flankservoj en la armeo, kiaj la sanitaraj, konstruadaj kaj ceteraj labor-plenumaj. La nazarenoj – temas nur pri ili – honeste utiligas tiun eblon, per kiu estiĝis plena ordo inter la konfesiaj ŝuldoj kaj la civitanaj devoj. La malnova konflikto estas tiamaniere solvita, evidente montrante la ŝtatan respekton al la konsciencaj problemoj de la kredantoj.

Legante kaj aŭskultante opiniojn de ekleziuloj, ankaŭ de aŭtoritatuloj, estis deduktebla la ĝenerala konstato: la kredo de la religioj prezentas *taŭgan fundamenton* de humanismo por la kooperado inter la diversaj religioj, kaj – ĉefe – por la kunlaboro kun la socialisma ŝtato, kun la aŭtoritatoj. La interligoj realiĝas ciutage, praktike sen embaraso, aŭ kiel oni ofte emfazas ambaŭflanke: *en agrabla atmosfero*. Ĉio ĉi prezentas vastajn eblojn – ofte ne tute eluzitajn pro febleco de eklezioj – por la evoluo de la etaj eklezioj, disvolvi ilian religian vivon. En iliaj medioj oni resumas koncize: „Ni apartenas al tiu ĉi socio, kaj ĝi estas ankaŭ la nia! La socialisma socio estis tiu en la hungara historio, kiu *garantias kaj realigas*, ke ni praktiku plenrajte nian religion, profitante el la ekzistanta *konfesia libereco*."

Ervin *Fenyvesi*

Budapeŝta Informilo jubileas

Certe multaj niaj legantoj scias, ke en Hungario aperas ankaŭ monata Esperanto-revuo, kiu modeste sin titolas „Budapeŝta Informilo". Fakte ĝi ne estas nur informilo: *ĝi aperas sur ĉ. 300 paĝoj dum jaro, kaj enhavas ne nur informojn, sed ankaŭ tre profundajn kaj elĉerpajn artikolojn pri diversaj aspektoj de la hungara kaj internacia movado. En februaro aperis la 100. numero de tiu ĉi revuo. Okaze de la jubileo ni intervjuis ĝian redaktoron, d-ron Árpád* Máthé, *kiu estas profesie universitata adjunkto pri kemio.*

Kiam kaj kiel ekis via revuo?

Tio evidentas per simpla kalkulo: en novembro de 1970. Tiam ĝi aperis nur en 200 ekzempleroj, kaj celis esti ligilo inter la ĉ. 600 Budapeŝtaj esperantistoj. Nuntempe nia eldonkvanto varias inter 2500–3000 ekzempleroj.

Ĉu ili ĉiuj iras al Budapeŝto?

Tute ne. Estus bone havi tiom da membroj en Budapeŝto . . . BI intertempe fariĝis landa revuo, kaj eĉ, triono de la ekzempleroj iras al eksterlando. Kompreneble, tiu fakto influis ankaŭ ĝian enhavon: ĝi **informas ne nur pri la Budapeŝta** esperantista vivo, sed ankaŭ pri la landa movado. Freŝe ni raportas pri gravaj internaciaj eventoj: fiere mi povas diri, ke post la 63-a UK la prikongresa numero de BI aperis pli frue ol tiu de la revuo „Esperanto". Ni aperigas aparte multajn informojn pri la movada vivo en la socialismaj landoj, do, BI estas abunda kaj fidinda fonto por ĉiuj, kiuj volas koni la atingaĵojn de la Internacia Lingvo en Orienta Eŭropo.



Ĉu BI estas oficiala informilo de HEA?

Formale ne, ĉar eldonas ĝin la Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA. Tamen, praktike ĝi plenumas tiun funkcion, ĉar ĝi estas la plej rapida kaj fidinda kanalo, per kiu la Estraro povas atingi la membraron.

Kiajn planojn vi havas?

Antaŭ ĉio konservi kaj eĉ pliigi nian ĝisnunan freŝecon kaj elastecon. Ni volus vastigi nian abonantaron en Hungario kaj ankaŭ eksterlande. La jarabono de BI estas relative malalta: *17,50 ned. gld. por 12 numeroj.* Mi vartas la esperon, ke tiu ĉi intervjuo vekos la scivolon de kelkaj eksterlandaj esperantistoj, kaj ili deziros ekaboni BI.

Do, ĝis post cent monatoj! Kiam tio estos?

En junio de 1987: sed eble iel ni formistifikos unu numeron, por povi jubilei samtempe kun Esperanto . . .

Dankon pro la intervjuo, kaj multajn sukcesojn.

V. *Benczik*

LEHEL

KOMPRESORA HEJMA FRIDUJO

HB 240 ***



HÜTÖGÉPGYÁR

Jászberény

Lasta memportreto el 1927

Onklo Piacsek kaj mia patro

JÓZSEF RIPPL-RÓNAI

Jam ekde multaj jardekoj por ĉiuj malgrandaj landoj, popoloj estas tre grava afero, ke ankaŭ iliaj talentuloj povu eniri la trezorejon de la mondliteraturo, mondarto aŭ tutmonda scienco. Sed la rekonigo de valoraj produktoj de malgrandaj popoloj ankaŭ nuntempe estas eksterordinare malfacila. Kial? La ĉefa obstaklo senŝanĝe estas la multlingveco kaj la malegaleco de ekonomiaj kaj kulturaj kondiĉoj.

La legantoj de Hungara Vivo konas la nomojn kaj kelkajn poemojn de Sándor *Petőfi,* Endre *Ady,* Attila *József,* sed, ke iliaj lokoj estas inter la senmortaj poetoj de la mondliteraturo, tion scias vere nur ni, hungaroj.

Estas analoga la sorto de Zsigmond *Móricz*, kiun en tiu ĉi numero ni prezentas iom pli amplekse. Sed, ke lia arto atingas nivelon mondliteraturan, verŝajne povas kompreni nur hungaroj.

La vojo de la pentristoj estas pli glata, ol tiu de verkistoj, ĉar la labor-rimedoj, materialoj, stiloj estas internaciaj, kaj plej grave, forestas lingvaj malfacilaĵoj, sed la jam menciitaj cirkonstancoj kaj la historiaj diferencoj same starigas barilojn antaŭ la pentristoj de negrandaj popoloj. Estas evidente, ke tiu fakto ofendas nian nacian memrespekton, sed dum mankas solvo en internaciaj rilatoj eĉ pri la plej gravaj sort-problemoj de la homaro, estus vane atendi la venkon de la justeco kaj racio ĝuste sur tiu ĉi kampo.

J. Rippl-Rónai (1861–1927) lernis kaj laboris en Parizo inter 1887 kaj 1900. Liaj amikoj estis. A. *Maillol,* E. *Vuillard,* P. *Bonnard,* M. *Denis,* P. *Gauguin,* li ekspoziciis kune kun ili. Lia arto estas en Hungario la plej „franca" pentroarto, sendube altkvalita, tamen li restas senmorta nur por hungaroj. Kelkajn liajn bildojn oni gardas en Francio, inter ili estas la eminenta *Portreto de Maillol* (Parizo, Muzeo de Modernaj Artoj), sed la plej gravajn pentraĵojn oni povas vidi en niaj muzeoj.

Lia stilo apartenas al la postimpresionismo, li estas izolita fenomeno en la hungara pentroarto, ĉefe pro sia *pointilisma*" tn. *maiza* epoko.

Je la fino de sia vivo Rippl-Rónai volonte laboris per paŝtelkreto. Li desegnis portretojn pri famaj verkistoj, inter ili pri Zs. Móricz. Ĉi tiun paŝtelon ni publikas sur la titolpaĝo. Mi klopodis elekti tipajn bildojn, bedaŭrinde pentraĵoj sen koloroj kapablas konkretigi originalojn nur parte, modeste. Precipe, se ni deziras prezenti al vi la pentrarton de Rippl-Rónai. Tamen mi kredas, ke la portretoj fidele ilustras lian grandan talenton, kaj pravigas miajn enkondukajn pensojn pri la diskriminacio, kiu trafas malgrandajn popolojn en la tereno de l' artoj.

Mihály *Gergely*

Parko kun nudoj



Palaco de l'Oriento – surtegmenta teraso de tapiŝo-bazaro en Tuniso

PANORAMO

Dezerto-Saharo



Malnova, etŝpura fervojlinio post inundo

Komenco de unu el la akvofaritaj kavoj

„Hungara" fervojo en Norda Afriko

La registaroj de Tunezio kaj Libio malfermis konkurson en 1974 pri kompleksa plano de fervojo kun normala traklarĝo inter la urboj Sfax kaj Tripoli. La internacian konkurson partoprenis la plej signifaj planistoj de fervojoj el pluraj landoj. La ĵurio komisiis la hungaran entreprenon UVATERV pri la planado (Entrepreno por planado de ŝoseoj kaj fervojoj).

Por venki la problemojn lanĉitajn de la varia tereno, la planistoj detale ekzamenis la ŝtonspecojn de la diversaj etapoj de la vojo. La grundo estis ekzamenita, kaj kiel konstrumaterialo, kaj kiel tavolo ŝarĝon portonta. Estas difinitaj la terenoj minacataj de sabloblovado, krome ĉiuj necesaj geoteknikaj indikoj por lokigi elektrajn kablojn, por kanalizado, por planado de vojoj kaj de fundamentado de 125 pontoj kaj 68 altaj konstruaĵoj.

La hungaraj planistoj sur ĉeloke studadis la grandecon de la urboj, ilian atendeblan evoluon, la vivoformon mem de la homoj kaj ne lastvice la historian kaj la modernan konstruarton tiean.

Dudek ok porpersonaj stacioj kaj tri ŝarĝo-stacidomoj estos konstruitaj sur la 500 km-jn longa fervojo kaj krome pluraj aliaj uzinaj konstruaĵoj por priservado.

La planita fervojo ekiras de Sfax sudorienten, trapasas la urbojn Gabes, Medenine, Ben Gardane kaj tra la libia landlimo atingas Tripoli.

(Fotoj: Sándor *Németh*)



Kamen Kalĉev, vicprezidanto de la Bulgara-, kaj Imre Dobozy, prezidanto de la Hungara Ligoj de Verkistoj, post la subskribo de la kontrakto

Kontrakto inter Ligoj de Verkistoj Bulgara kaj Hungara

La kontrakto, subskribita la 26-an de februaro, celas helpi reciprokajn vizitojn de verkistoj, arttradukistoj, redaktoroj de literaturaj gezatoj. Surbaze de ĉi tiu kontrakto jam estas atendataj bulgaraj gastoj al la solenaĵoj okaze de la centjara naskiĝdatreveno de Zsigmond Móricz. Ankaŭ hungaraj verkistoj estas inivititaj al la aranĝaĵoj de la bulgara Tago de Poezio kaj al la literatura renkontiĝo memore al la sepdeka datreveno de la naskiĝo de Nikola *Vapcarov*.

Hungaraj poetoj bulgare

Bulgarlingva antologio aperis en Sofio. Ĝi entenas poemojn de pli ol sepdek klasikaj kaj nuntempaj hungaraj poetoj. La 430-paĝan volumon tradukis kaj redaktis *Nino Nikolov*.

PANORAMO

La fortikaĵo de Gyula, kie tradicie estas aranĝata la Somera Esperanto Universitato

Someraj universitatoj en 1979

Pasintan jaron dek sep somerajn universitatojn organizis la Hungara Sciencpopulariga Societo. El Finnlando kaj el Bangladeŝo, el Brazilo kaj el Sovetunio, el Usono kaj el GDR – entute el tridek ok landoj – mil tricent interesiĝantoj venis por ĉeesti ĉi tiujn aranĝaĵojn.

Ĉijare la Societo antaŭpreparis eĉ pli riĉan programon por la partoprenontoj. En Kecskemét (06.25 – 30) temos pri socia edukado en la infanĝardeno. En Miskolc, la prelegoj okupiĝos pri la rilato inter la socialista vivmaniero kaj la publikviva pensado (06.25 – 07.07). En la somera universitato de Baja temos pri la akvoekonomiko de produktaj sistemoj de la agrikulturo (07.02 – 07) kaj en tiu de Salgótarján sub titolo: Junularo '79 pri nia epoko kaj la infano.

En la Somera Esperanto Universitato de Gyula la prelegoj okazos en Esperanto, el la terenoj de natur- kaj sociosciencoj kaj pri diversaj branĉoj de artoj (07.08 – 14).

Budapeŝto atendas tiujn, kiuj interesigas pri la ŝtata vivo, konstitucio kaj la publika ordo de Hungario (07.09 – 21), Zalaegerszeg donas hejmon al la etnografia somera universitato, okupiĝonta pri la hodiaŭa rolo kaj utiligebleco de popolaj tradicioj (07.09 – 22). Du sekcioj laboros en Sopron pri medioprotektado, naturdefendo kaj arbarkulturo, (hungara sekcio 07.11 – 18., internacia sekcio 07.11 – 23). Studentoj de la arta somera universitato en Esztergom konatiĝos kun la ebloj de la Kodály-metodo, kiel ĝi helpas evoluigi muzikajn orelojn kaj muzikan skribo- kaj lego-kapablon de infanoj (07.12 – 25).

Prelegontoj de la somera universitato de Balatono en Veszprém parolos pri historio de la lago kaj de ĝia regiono, krome pri akvoekonomiko de la „hungara maro" kaj pri ĝia interesa faŭno (07.15 –25). Teknologio de instruado estas la temo de la pedagogia aranĝaĵo-serio en Szeged (07.16 – 25). La hungaran lingvon kaj literaturon povos ekkoni partoprenontoj de la aranĝoj en Debrecen (07.23 – 08.20). Du sekciojn havos la somera universitato Amikeco de Popoloj (07.27 – 08.06., Pécs; 08.07 –18., Harkány). Universitato pri kulturteorio okazos en Szeged (07.27 – 0.804) kun prelegoj pri la rolo de intelektularo en la publika klerigado kaj en elformado de publika opinio. La partoprenontoj de la lekcioj de Eger aŭdos pri defendo de historiaj popolaj konstruaĵoj (07.30 – 08.08). La verkaro de Zsigimond Móricz, – naskiĝinta antaŭ cent jaroj – staras en la fokuso de la historia kaj literatura universitato de Nyíregyháza (08.01 – 13). *Georgikon* (agrikultura altlernejo de Keszthely) promesas valorajn du semajnojn al tiuj, kiuj interesiĝas pri defendo de vegetaĵoj (08.01 – 14).

En Székesfehérvár okazos prelegoserio pri rolo de komputiltekniko en la agrikulturo (08.06 – 15). En la prelegoj de la Budapeŝta Ekonomia Universitato oni parolos pri ĉefaj demandoj de la hungaraj ekonomia vivo kaj ekonomia politiko (08.06 – 18). Infano en la urbo estas la titolo de la somera universitato Savaria pri urbanistiko en Szombathely. Finos la riĉan serion la projekciadoj kaj prelegoj de la filmarta somera universitato de Eger (08.11 – 20).

La studentoj de la someraj universitatoj krom partopreno en la lekcioj povos ekkoni ankaŭ la ĉirkaŭajn regionojn kaj ĝui plurajn artajn, kulturajn aranĝaĵojn.

Pra-mapo

Preskaŭ tricentjara marista mapo estis trovita en la Transdanubia urbo Győr. Ĝi pretĝis en Parizo en la jaro 1693. Sur la riĉe ornamita mapo estas videblaj la Atlantika Oceano, la Mediteranea-, la Balta- kaj la Norda-maroj kun navigaciaj vojoj, ĉebordaj fortresoj kaj havenoj. La valora mapo estos deponita en la muzeo de Tata.

Pasintan jaron oni aranĝis jam la duan fojon internacian seminarion por fakuloj de restaŭrado en Veszprém

En arta universitato de Esztergom, Taeko Tamura (Japanio) prezentas kanthoron. La studojn gvidas Erzsébet Szőnyi, Erkel-premiita komponisto, profesorino de Muzika Altlernejo de Budapest

REVUO DE REVUOJ

Bebaĵoj komencis laste ĉi tiun rubrikon, eble surprize por kelkaj viraj legantoj, kiuj ne kutimiĝis legi pri vestado kaj higieno de la plej-junuloj. Sed tutcerte neniu estos surprizita, se legas nun pri la Internacia Jaro de la *Infano*, almenaŭ pri kelkaj resonoj en nia gazetaro. La sonorilojn ekgongis – kiel decas – niaj gvidaj revuoj, ESPERANTO kaj HEROLDO, kiuj memorigis, ke ankaŭ la sorto de la Internacia Lingvo evidente dependos de la nunaj infanoj. El artikoloj de la senlaca, energiplena sveda aganto, *Lennart Åberg*, reliefiĝis animskuaj sortoj de 500 milionoj da infanoj en la mondo: manko de nutraĵoj, manko de pura akvo, manko de elementaj necesaĵoj, manko de . . . kaj por centmilionoj ankaŭ lerneja edukado, kaj plu . . . En nia alte civilizita mondo tiel statas la mizero en subevoluintaj landoj, t.e. ekskoloniaj landoj. Kiu havas konsciencon, devas klare vidi kaŭzojn de tiuj vivminacaj mankoj, la preman ombron de la forsuĉanta „moderna" ekonomio, ankoraŭ koloniece seniganta multajn landojn de siaj necesaj rimedoj. La neŭtraleco de nia internacia movado ne ekskluzivigas klarvidon!

Kiajn oponojn havas politikistoj kontraŭ interlingvo? La multflanka *Bernard Golden* donas skizan respondon je tiu demando en grava angla fakrevuo, kion peras al ni la centokula INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO: Sur listo de la malfavoraj vidpunktoj staras antaŭjuĝoj, timemo, suspekto kaj memkompreneble konservativemo. Persona timo ekzemple, ĉar post revolucia ŝanĝiĝo de la interkomunikado, la politikisto devus lerni (plian) lingvon, eĉ je alta nivelo; nun interpretistoj deprenas liajn zorgojn. Diplomatoj, precipe se poliglotoj, ne rimarkas la malfacilaĵojn de aliaj, eĉ profitas el siaj esceptaj lingvokonoj. Estas aliaj, kiuj malfermas okulojn antaŭ tiu problemo kaj lasas ĝin al postaj generacioj . . . La unuaj paŝoj estas ja riskaj se aliaj ne sekvos ilin. Estas kiuj sentas, ke la manipuladon de homamasoj – majstre faritaj de riĉaj gazetkonzernoj, allogaj koloraj magazinoj, televido-retoj – forte embarasos IL kaj iel malhelpos produkti konsumsocion. La senperaj interhomaj, parolaj kontaktoj povos malvualigi kalumniojn kaj mensogojn pri sociaj turniĝoj, ebligos vidi alimaniere ol sugestite, manipulite. Kiom bone konata situacio en Esperantio!

Videble prezentas sin la gravega tasko, atingi en politikaj sferoj, en internaciaj organizoj pere de kunordigitaj paŝoj pli da aprobo, da simpatio. Feliĉe, ni akiris tion ĉe *M'Bow*, ĝen. direktoro de Unesko, kiu iĝis amika apoganto de nia movado pere de siaj propraj spertoj. En ESPERANTO legeblas i.a. liaj vortoj: „Mi bone memoras la vere fratecan etoson de via kongreso en Rejkjaviko, nenie alie mi renkontis tiun etoson . . . Se mi denove ĉeestus vian kongreson, *mi dezirus paroli en Esperanto.*" Gajnante tiel prestiĝajn kaj influajn *personojn* de la internacia vivo, ni gajnas ofte pli, ol per aliaj sukcesetoj.

Akordas al tio la tutpaĝa *Publika Letero* en hungaraj fakrevuoj de fremdultrafiko kaj aŭtomobilturismo, kiun publikis ankaŭ nia hungarlingva propagandcela E-revuo VILÁG ÉS NYELV (Mondo kaj Lingvo), samformata kiel HV). Ĝin subskribis gvidantoj de la kompetentaj sindikatoj, aŭtoritataj lingvisto-profesoro, verkistoj, ĵurnalistoj, kiuj alvokas la hungarajn organizojn de turismo kaj trafiko *lanĉi internaciajn iniciatojn* por Esperanto. Ili argumentas, ke favore al la veturantoj kaj al la laboruloj de tiuj ekonomiaj branĉoj, *nur la IL* kapablas solvi la kontakto-malfacilaĵojn. Lernado de „mondlingvoj" fiaskis kiel solvo, dume la etaj lingvoj estas diskriminaciataj. Oni devas publike diskuti pri tiu grava afero, kaj decide antaŭenpaŝi – rekomendas la subskribintoj de tiu Publika Letero.

Foliumante inter niaj revuoj, la atenton agrable tiras al si serioza enhavo de la modest-aspekta bulteno de la Saarlanda E-Ligo, titolita DIALOGO. Kompetentaj plumoj verkis valorajn recenzojn, kiuj konsistigis grandan parton de la legita numero. La senriproĉa, bona lingvaĵo aludas al escepte zorga redaktado. La abunda eldona agado de la Hungara E-Asocio kompreneble respeguliĝas en la recenzoj, kaj persone mi ĝenerale konsentas. Pri la jam furora libro de F. *Molnár*, „La knaboj de la Paŭlo-strato" pravas la recenzanto ekzemple, riproĉante iom da malglataĵojn en la 40-jara traduko. Eble ne senutile, se mi mencias, ke tiu dua eldono pro la fotorepreso-metodo ne ebligis teksto-reviziojn. Alia ĝentila deziro tamen, diable! denove ekincitas pro la personaj nomoj. La hungardevena recenzanto bonintence imagas helpi al francoj, germanoj per Esperantigo de nomoj, anstataŭi „neprononceblajn" hungarajn nomojn je „legeblaj". Sed okuloj ne bezonas prononcadon, kaj tial ne estas hazarde, ke jam delonge firmiĝis internacia kutimo – latinskriba – por uzi originalajn nomformojn en tradukoj. Nek *Kalocsay*, eĉ malpli *Zamenhof* sekvis naciismon, kiam ili uzis la (por multaj!) „neprononceblajn" nomojn: Fortinbras, Guldenstern, Gloucester, Cornwall, aŭ ilian, plumon torturantan, aŭtoron, Shakespeare! Personoj kunportas sian lokan aromon ankaŭ en la nomo, eĉ en la ortografio, kion perdante leganto ne gajnas!

Tiun gravan taskon, prezenti librojn al la legantoj, prave kaj brave plenumas ankaŭ la juna sed forta ESPERANTISTO SLOVAKA. Inter pluraj mi ne povas preteriri la recenzon pri satiro de Izrael *Lejzerovicz:* El la „Verda Biblio". La deziro de la recenzanto vere ŝajnas esti akceptinda, precipe de la movadon varme amantaj samideanoj: „plenuminda misio de tiu satiro estas *instigi* al profunda studo de nia movada historio." *Trafe!*

Ervin *Fenyvesi*

Vortfinaj fonemoj en Esperanto

Dum jaroj mi pretigis Esperantan vortfinvortaron, kiu atendas eldonadon. Mi elektis la morfemojn el la Esperanta-hungara vortaro de Alfonso PECHAN, kaj tiujn morfemojn mi aranĝis en alfabeta ordo laŭ vortfinoj.

La vortfinvortaro povas kalkuli pri interesiĝo de oficialaj kaj amatoraj lingvistoj, ĉar lingvistike interesa estas ĉefe la fino de la vortoj. La inverse ordigita vortmaterialo helpas la lingvistikajn analizojn, rekte proponas sin por analizi la vorttrezoron de Esperanto. La tabeloj de finaĵoj, digramoj, trigramoj ĉiuj helpas la analizan laboron. Tiuj demonstroj alvokas la atenton pri la ĝustaj kaj malĝustaj, dezirindaj kaj ne dezirindaj tendencoj, kaj helpas decidi al la lingvistikaj kompetentuloj. Tiu vortfinvortaro estas grava helpilo por interlingvistiko, por kompara lingvistiko. Sed bone povos uzi ĝin la esperantistaj kluboj, por amuzaj programoj, ktp.

Tiu vortfinvortaro enhavas 6916 morfemojn. Inter ili – nature – rolas nek kunmetitaj nek afiksitaj vortoj.

Jen kelkaj interesaj kalkuloj.

Je konsonanto finiĝas 88% de la Esperantaj morfemoj, je vokalo 12%. 27,44% de la morfemoj finiĝas je du konsonantoj (el la 307 digramoj 121). Je tri konsonantoj finiĝas nur 130 morfemoj (1,88%). Jen tiuj trigramoj: MPF, MBL, NGL, NKL, RKL, SKL, MPL, STM, MBR, NDR, NGR, NKR, SPR, KTR, LTR, NTR, PTR, RTR, STR, ŬTR, NKS, NKT, RKT, LPT, MPT, KST, NST, RST, NGV.

Plej multe da Esperanto morfemoj finiĝas per T (15,28%), R (11,5%), N (10,43%), L (10,29%) kaj I (8,76%). Do 56,26% de Esperanto vortoj finiĝas nur je kvin sonoj! kaj ne atingas 1%-n la sekvaj finaĵoj (laŭ la ofteca ordo): ŝ, j, a, o, ŭ, ĥ, ĵ, h. Interese, ke 90% de vorttrezoro finiĝas je iu el 14 sonoj, kaj la restintaj 10% finiĝas je la ceteraj 14 sonoj! (Vidu la 1-an ilustraĵon!)



1a ilustraĵo

Tre interesaj estas ankaŭ la vortfinaj digramoj. La preskaŭ 7000 Esperanto-morfemoj havas 307 digramojn. Plej multe da Esperantaj vortoj finiĝas je IK kaj ON (2,83–2,83%). Poste sekvas NT (2,78%), AL (2,44%), ER (2,36%). Duono de la morfemaro de Esperanto havas 29 vortfinajn digramojn, la alia duono 278 digramojn. 17,92% de digramoj estas troveblaj nur unufoje.



2a ilustraĵo

Kelkaj indikoj pri la trigramoj: la 6916 morfemoj havas 1783 vortfinajn trigramojn. Nur unu trigramo troveblas super 1%, *ENT*. 10% de la morfemoj havas la sekvajn vortfinajn trigramojn: ENT, TIK, ISM, ACI, TOR, TIV, OGI, STR, EKT, ENC, TER, IST, TUR.

Duono de la morfemaro havas nur 224 vortfinajn trigramojn, la alia duono 1559. 11,68% de la trigramoj nur unufoje estas troveblaj en la vorttrezoro.

Iom pri la longeco de la morfemoj en Esperanto. Unusona estas 5 morfemoj, 2 sonojn havas 107, tri sonojn 731, kvar sonojn 1356, kvin sonojn 1401, ses sonojn 1343. 15 sonojn havas nur du vortoj.



3a ilustraĵo

Interese, ke 3600 vortoj (52%!) enhavas maksimume kvin sonojn, 5000 morfemoj (71%) maksimume ses sonojn! La plej longaj morfemoj estas la I-finaĵaj (meznombre ili havas 6,75 sonojn), la plej mallongaj estas la O-, A-, Ĥ- kaj J-finaĵoj (ili ne atingas kvarsonan meznombron).

László *Tölgyesi*

Elstara agado de Stefano Széchényi en la evoluigo de la hungarlanda akvomastrumado

1

D-ro Ferenc László



István (Stefano) Széchenyi

En la socia-ekonomia evoluo de Hungario ĉiutempe havis grandan signifon la akvorilataj laboroj, kio estas komprenebla, se oni konsideras la specifan geografian situon kaj la ekstreman klimaton de lando. Nemalmultaj memorafoj skribitaj kaj surloke restintaj objektoj atestas, ke sur la teritorio de nia lando jam ankaŭ la romianoj efektivigis gravajn laborojn. Ekzemple dum regado de imperiestro *Galerius* (kunreganto de *Diokleciamo,* en 293 guberniestro en Danubregiono) estis elfosita la granda fluejo de la hodiaua *Kis – Rába* (Malgranda Raba, kunliganta la riverojn *Raba* – la Aŭstria parto *Raab,* – kaj *Répce* – en Aŭsrio *Rabnitz*), krome reguligoj de rivereto *Gyöngyös* (trafluanta urbojn *Kőszeg* kaj *Szombathely*, proksime al la Aŭstria landlimo) kaj de la kanalo *Principal* („tre grava"); jam tiam estis regulita la forkonduko de la Balatona superflua akvo per la drenkanalo Ŝio (al la Danubo)[1]. El la restintaj skribaj dokumentoj montriĝis, ke jam en la 15-a jc. ŝtataj disponadoj zorgis pri iuj hidrologiaj laboroj, ĉefe en intereso de la ŝirmado kontraŭ akvaj damaĝoj.

Menciinda ĉapitro de la historio de hidrologiaj laboroj en nia Patrio estas la tempo de la *reformepoko*[2]. Kompare kun la pli fruaj iniciatoj ni povas esti rekonantoj de ĉiam pli vasta hidrologia agado de tiu tempo. La organizadon, direktadon de tiurilataj laboroj prenas en la manojn Stefano *Széchenyi*[3] la eminenta ŝtatisto, gvidanta ekonomi-politikisto de tiu tempo. Li komencis sian publikan agadon en la parlamento en jaroj 1825–27.

La vivoverko de St. Széchenyi, liaj sociaj, politikaj, ekonomiaj ideoj, iniciatoj, entreprenadoj formas tre organikan, multfacetan kaj en ĉiuj siaj detaloj strikte interplektitan komplekson. Li laboris paralele kaj kun sama intenso por enkonduki ĉevalkonkursojn, evoluigi bredadon, krei la Sciencan Akademion, kaj same por organizi la industriizadon, kazinojn, teknikajn kaj ekonomiajn fakinstruadojn, lukti por la ekprosperigo de socia kaj ekonomia vivo, por egaleco antaŭ tribunalo, por abolicio de la *aviticito,*[4] ktp. Estas konstateble, ke inter siaj multfacetaj aktivadoj li ĉiam pli kaj pli turnis sian atenton je la problemoj de trafiko kaj riverreguligo.

Széchenyi rekonis per siaj Franciaj kaj Angliaj spertoj la fundamentan ekonomian signifon de la akvovojoj kaj ĝenerale de la bona trafikado, – kaj klare vidis, en kiu mezuro bremsas la prosperadon de la lando la senordo de la akvoj. Tial li dediĉas vastan lokon al la akvoproblemoj en siaj sociaj planoj.

Széchenyi konis, studis kaj pritaksis la pli fruajn iniciatojn, montriĝantaj sporade sur tereno de akvoreguligoj. Lia historia merito estas, ke baziĝante sur la atingitaj rezultoj kaj sur la pli novaj, laŭplane faritaj mezuradoj, kaj sur siaj propraj observoj li elformis programon de akvoreguligoj kaj trafikevoluigo ampleksanta la tutan landon. Ties sukceson li certigis per celhava kaj altruisma laboro de jardekoj, donante per tio fundamenton ankaŭ por evoluado de niatempa moderna hidrologia politiko kaj akvomastrumado.

Nome li sciis:

„La riveroj . . . sin ne aranĝos, nek sin interligos. Por tio estas bezonataj manoj, multaj manoj, sed en plej alta harmonio gvidata per vera scienco."

Kaj li konfesis:

„Havas valoron, havas ekstreme grandan valoron la vorto, tio ne estas negebla: sed nur la faro, al unusola celo ambicianta faro de centmiloj povas levi nian nacion . . . el ĝia ekstreme malalta pozicio."

Li planis, kreis ne sole programon, sed klopodis ankaŭ agi, kaj nome el konsiderita antaŭvido, kio evidentiĝas ankaŭ el la sekva memkonfeso:



Memormonumento de Széchenyi en Tiszadob

„Nenion mi faris improvize, pro momenta vervo, sed ĉiuj miaj paŝoj, ĉiuj miaj agadoj estas naskitoj de antaŭe kalkulita, lontanen efikanta plano."

Neniel, eĉ por momento ne povas esti dube, ke en la reformepoko laŭ elpaŝo de Széchenyi ekmovigis la evoluontajn fortojn preskaŭ sur ĉiu kampo de la vivo de la nacio. Lia pensadsistemo en du direktojn vastigis la hejmlandan koncepton de la politiko: li postulis la unua, ke oni devas alpreni en la politikan vivon ankaŭ la nenobelajn amasojn, do ankaŭ la servutulan kamparan-tavolon, oni lokigu ankaŭ ilin „sub la egidon de la konstitucio". Li metis la unuan fojon la problemojn de la ekonomia konstruado en la fronton de la politika vivo. Li estis la unua vera hungara ekonomi-politikisto, kies ideoj ĝuste respegulis la bezonojn de la evoluo de la socio, – kaj tiel tiuj povis iĝi efikaj faktoroj de tiu evoluo. Li montris la unua, ke la grandeco de la nacio baziĝas sur sia riĉeco, kaj tiu lasta sur la libera evoluo kaj prosperiĝo de la laborforto kaj talento.

Liaj altnivelaj etikaj kaj politikaj celoj asociiĝis kun sobra kaj reala ekonomia laborprogramo kaj la realigon de tiu programo apogis senĉesa, senlaca laboro, ampleksanta ofte eĉ la plej ĉiutagajn detaltaskojn. Széchenyi deziris solvi la taskojn de la „naci-edukado" per kompleta transformo de la materiaj vivcirkonstancoj. En siaj grandiozaj kritikaj verkoj: *Hitel, Világ, Stádium* (Kredito, 1830; Mondo, 1931; Stadio, 1933) li nomas bazaj kaŭzoj de nia kultura kaj materia senevoluiteco la sekvajn: la feŭda strukturo de la lando, la aviticito, la servutula laborrilato, krome la manko de kredito, trafiko, de interna merkato, kaj la malmoderniĝinta ŝtatadministrado. Li opiniis, ke krom la ekonomia kaj kultura neprogresinteco, ankaŭ la departementa partikularismo, la politika diseriĝo havas la prakaŭzon en la nemoderneco de la trafiko kaj manko de interkomunikado. Tial li akclentis, ke pla plej grava ilo por la leviĝo de la lando estas evoluigo de la trafiko kaj komerco. Tial estas kreendaj la akvaj kaj surteraj vojoj necesaj por la trafiko, do la akvoreguligoj, kontraŭ-inundaj laboroj kaj drenadoj – kaj samtempe la konstruado de la komercaj kaj kulturaj landaj centroj.

Tio donis la motivon preni en siajn manojn la aferon de la Danuba navigado, kaj tial li staris avane por la movado: organizi la „Danuba Vaporŝip-Asocio"-n; tial li urĝis la kreon de sekuraj ŝipvojoj, la reguligon de Danubo. Tial li veturis kune kun Jozefo *Beszédes*[5] sur Danubo de Peŝto ĝis la Nigra Maro, ke ili vidu la malhelpojn de la navigado kaj samokaze ili spertu-ekkonu la ekonomiajn eblecojn prezentiĝontaj pro la reguligo.

Post la estigo de la Danuba vaporŝip-trafiko Széchenyi metis sur la tagordon la navigadon sur lago Balatono kaj sur rivero Tiso. Tre grandsignifa rezulto de lia laboro estis la komenco de la Tiso-reguligo.

La hidrologia politiko de Stefano Széchenyi estis tia ekonomia koncepto, kiun oni povis nomi „hidrologia programo" de la reformepoko pro ĝia unika kaj pionira karaktero. Ties plej grava kaj plej konata parto estis la programo de *„ordigo de la Tiso-valo"* kaj ĝia teknika elemento: la Tiso-reguliga projekto de Paŭlo *Vásárhelyi*[5].

La grandiozecon de tiu spirita produkto montriĝanta en la projekto cirkonspekta kaj antaŭrigarda, oni vere nur nun komencas scii kaj kompreni, – unuparte per la ĉiam pli plena ekkono de la historiaj premisoj kaj situacio, aliparte surbaze de la spertoj de la tempo pasinta de tiam. La refoja lego de tiurilataj skribaĵoj de Széchenyi malkaŝas ĉiam pli kaj pli da novaj kaŝiĝintaj fazoj, kaj alvokas la atenton je instigiloj de la plano antaŭe eĉ ne konjektitaj. Nove kaj denove ni povas miri lian informitecon, orientiĝon en la hejmlanda kaj internacia historio, lian ĝisfundan solidecon, konsciencon – en la ekzameno de la soci-ekonomia neceseco de la taskoj kaj de ĝiaj ebloj, en la vicordo de la laboro kaj atendeblaj konsekvencoj.

Multaj signoj aludas al tio, ke ankaŭ Széchenyi bone sciis, ke la stato de Tiso-valo rigardata praa, grandparte estas sekvo de homa interveno, do la elformo de stato pli favora – respektive la restarigo – estas ebla! Tiel li bone vidis ekz. la rolon de la akvomuelejoj en la elformado de la marĉ-regiono kaj de ĝia konservo[6], aŭ la efikon de la arbar-ekstermo – kaj urĝis ties plibonigon en intereso de „Ordigo de Tiso-valo"[7].

Széchenyi vidis ankaŭ tion, ke la akomodiĝo al la malboniĝintaj cirkonstancoj kreis novan specialan popolan mastrumadon, nun nomata „inundterena mastrumado": utiligo de la terenoj, – kiujn provizas per akvo periode aperantaj inundoj, – per subĉiela („kruda") bredado, per akvomuelejoj, per fiŝkaptado, eĉ per fiŝbredado. Tio pruviĝis retena forto ne nur objektive, sed ankaŭ subjektive. Tial li urĝis per tia timperforta klopodo la utiligon de la favora psikologia momento kaŭzita per la inundoj de la 1840-aj jaroj por komenci la laborojn.[7]

Samtempe li bone rimarkis, ke iĝis nekonservebla, eĉ malhelpa por la plua evoluado tiu vivoformo, resp. mastrumad-maniero, kiu antaŭe estis tre bona pruvo pri vivkapablo kaj nivelkonservo de la popolo per la akomodiĝo al la plej malfavoraj cirkonstancoj.[6]

Paŭlo Vásárhelyi

Tiurilate estas menciinde, ke Széchenyi – laŭ unu el siaj lastaj verkoj: *„Programo de la ordigo de Balatono"* – volis preventi la atendeble malfavoran efikon de la reguligoj rilate la fiŝmastrumadon: la ĝistiama fiŝmastrumado havis por la fiŝbiologio favorajn kondiĉojn en la nereguligitaj akvoj, inundejoj, – tiujn li volis ekvilibre anstataŭigi per kreo de artaj lagoj, ido-bredaj instalaĵoj.[8]

Resumante la ĝis nun publike konatajn faktojn: Széchenyi bone vidis, ke post la forigo de la inundodanĝero, kiu estas ne disigeble kunligita kun la riverreguligo – naskiĝos ebleco por la drenadoj, aŭ grundakvoforkonduko. Sekva paŝo estos, – eble jam kiel tasko de estonta generacio – realigo de la irigacia mastrumado. Samtempe okazos ĉiuspeca utiligo de la akvoj: kune kun la navigacio kaj produkto de akvoenergio.[9]

Elirpunkto de liaj cirkonspektaj kaj antaŭrigardaj hidrologiaj planadoj estis tiu baza rekono, ke la Tiso-valo estas nedividebla hidrologia komplekso, kies ordigon oni devas solvi laŭ unuecaj, tutnaciaj vidpunktoj, kaj ne laŭ lokaj interesoj.[7]

La protektadon kontraŭ inundoj, la riverreguligon, do la liberiĝon de akvonocoj, la „pasivan akvomastrumadon", kiun kelkaj lokigis en la unuan vicon seniginte ĝin de la interrilatoj, li deziris solvi tenante antaŭ la okuloj la interesojn de akvoutiligo. Ripetite li akcentis tiun cirkonstancon, ke

„super ĉio ne estu malbonigita – tie, kie la naturo kreis – la ebleco de irigaciado, kiu por nia patrio povos esti en la estonteco simile granda beno . . ."[10]

Aŭ aliloke:

„. . . la irigacio . . . kiun kvankam nur la estonta generacio atingos, sed kiu pli aŭ malpli frue fine devos efektiviĝi, se havos futuron la hungara nacio sur la granda hungara ebenaĵo . . ."[11]

(En sama senco deklaris pli poste ankaŭ la itala hidrologia inĝ. Petro *Paleocapa* – akceptinte kaj teknike apoginte liajn konsiderojn.[12]

Aparta kaj neelĉerpebla problemkomplekso estas, ke Széchenyi ekzamenis la teknikajn perspektivojn de la planado ne izolite, sed „dialektike" en kadro de la plej vastaj soci-ekonomiaj koneksoj: li deziris certigi la kreon de materialaj bazoj en la intereso de la socia-ekonomia evoluo per helpo de mobilizo de konvenaj sociaj fortoj. La tasko de reguligo de la Tiso-valo interplektiĝis en liaj okuloj kun la likvido de „feŭdaj katenoj", kun la purigo kaj renovigo de nia „konstitucio" . . . Li rigardis la akvoreguligon unu el la decidaj ĉeneroj en la evoluo de prosperigo en la agronomio, varprodukto, trafiko, komerco kaj de kolonioj enlandaj.

Széchenyi prenas en siajn manojn la reguligon de rivero Tiso

La plurjara inunda perioro plaganta la Tiso-valon atingis sian maksimumon en 1844–45: en tiuj jaroj la inundo kovris la tutan valon de Tiso, kaj la akvoamaso kolektiĝinta en valo de Meza -kaj Malsupra - Tiso dum unu kaj duon-jaroj ne foriĝis el la inundejo de Szeged kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

En tiu situacio, – elformiĝinta pro la ripetiĝantaj eksterordinare grandaj inundoj, – la palatino printempe de 1845 donis la planojn kaj memorandojn pretiĝintaj por la Tisoreguligo al la Hidrologia Ĉefdirektoraro por ricevi de tiu ekspertizan opinion. En tiu tempo St. Széchenyi alligiĝis jam en la disponadojn pri tiuj aferoj, kaj laŭ lia konsilo oni pretigis per la inĝeniero Paŭlo *Vásárhelyi* projekton – respondantan al la komunaj interesoj – por la unueca reguligo de Supra-Tiso kaj por seninundigo de ties valo.

La inundprevento de Tiso-valo tiam jam aperis kiel tre urĝa tasko. Nome la cetere nocaj inundoj provizis per akvo grandajn terenojn kaj tio favoris la eksterstalan bredadon, kaj krome la marĉoj certigis la viveblecojn al la fiŝistoj, kaj tiuj faktoroj fariĝis ne plu tolerebla bremsilo por la evoluo – ĝuste pro la plimultiĝo de la popolo, kaj por la ekflorado de la ekonomia vivo: ili malhelpis la plivastigon de la gren - produktado kaj de la varinterŝanĝo. Samtempe – pro la ripetiĝintaj inundoj – nun jam ankaŭ la publika opinio ciam pli forte postulis la komencigon de la reguligo kaj inundoprevento. La grandiozecon, signifon kaj la fiaskilojn de tiu tasko malmultaj rekonis, kaj neniu tiel bone perceptis, kiel Stefano Széchenyi.

Aŭtune de 1845 okazis lia grandsukcesa agita kaj organiza rondveturado kune kun Vásárhelyi por prepari kaj organizi la fondon de Tiso-vala Asocio kaj de la Tiso-reguligo. Ili tramigris ankaŭ la Mezan kaj Malsupran Tisoregionon kaj tiel senpere ili konatiĝis kun ties grava situacio. Tio solidigis lian konvinkon, ke la reguligan laboron oni devos kaji nur tiel licas komenci ne nur sur la etapo de la Supra Tiso-valo, sed nepre en la kadro de unueca aranĝo de la *tuta* Tiso-valo.

Samtempe Széchenyi bone vidis, ke en la solvo de la grandioza tasko – tuŝanta tutan landparton, do havanta landan intereson, – li ne povas sin bazi sur la departementoj, sur la „akropolo" de la feŭda konservemo kaj de partikularismo, kaj ne pova kalkuli eĉ je la parlamento „mergiĝinta" en memcela politikismo kaj estas[13] inerta. Krome, kiel tion montris la spertoj koncerne la Mal-

supra-Danubo-n, oni ne pova kalkuli eĉ al la registaro: *„nek al iu, nek al alia* – li skribas – *se oni povus tiel diri: brulas la afero sufiĉe sur la haŭto . . .*" Tial li serĉis la eblecon de la solvo en la tiam elformiĝanta nova organiza formo: en la memvola asociiĝo de la interesatoj, ke poste la asocioj estu certigitaj pri la apogo de la parlamento kaj registaro . . .

Li rekonis, ke jam forpasis la tempo de la departementaj inundpreventaj asocioj kun limigita ebleco, kiel simile superkreskis ankaŭ la ŝtataj hidrologiaj taskoj rilate la pli fruajn riverreguligajn agadojn. Kompreneble la organizaĵo de la hidrologia administrado, de la efiksfero, kaj ĝenerale la hidrologia politika perspektivo apenaŭ povis progresi kune kun la evoluo de la taskoj. La elirvojon proponis la asocia formo respegulanta la ĝeneralan ekonomian evoluon kaj la influon de la burĝaj transformiĝaj klopodoj, kiujn Széchenyi salutis kiel heroldojn de nova epoko.

La luktado de Széchenyi – kontraŭ la konservemo kaj opoziciemo de la departementoj, kiuj ambaŭ ofte ridigiĝis memcelaj kaj maskantaj la klasinteresojn, – ankaŭ en tiu okazo servis la nacian progreson. Por realigi la unuecan Tiso-valan Asocion li multe devis lukti kontraŭ la latifundiuloj ĉe la Supra-Tiso, kvankam tiu organizaĵo servis ankaŭ iliajn interesojn, kaj unuavice la interesojn de la Grandebenaĵaj kampulurboj: *Szeged, Csongrád, Szentes, Hódmezővásárhely,* ktp. Do li rigardis ankaŭ en tiu kazo multe pli foren trans la senperaj interesoj de la evoluigo de la grandaj bienoj, kaj li havis antaŭ la okuloj la postulojn de la ĝenerala nacia prospero.

Kompreneble oni ne povas elpreni lian hidrologian politikon el la kadroj de liaj ĝeneralaj ekonomi-politikaj konsideradoj, sed ankaŭ tiuj ne estas kompreneblaj sen lia hidrologia programo. Kiel en aliaj aferoj. Li deziris antaŭeniri sur la vojo de la eblecoj: li serĉis ĉiam tiujn terenojn, kie la kapitalisma evoluo de la hungara agrokulturo (kaj ene de ĝi la evoluigo de la grandbienoj) – kaj la ĝenerala ekonomia-teknika prospero de la lando ne trafas senpere la interesojn de la kortego, – eĉ la efektiva (aŭ kelkfoje nur tendence akcentita) „interessameco" certigus la registaran apogon . . . Lia aktiveco en la intereso de la trafiko (navigacio, riverreguligo, konstruado de *Lánchíd* [Ĉenponto, la unua ponto inter Peŝto kaj Buda], ktp.) li trovis per la kompleksa aranĝado de Tiso-valo tiun rimedon, kiu plej efike povas servi la atingon de la dezirata celo: la ekonomian-teknikan evoluadon de la lando per konstruo de fundamento de ekonomia evoluo de tuta landparto . . .

Tiso-reguliga programo de Széchenyi

Siajn spertojn akiritajn dum la organiza rondveturado li publikigis en januaro de 1846 en sia broŝuro: *„Ideofragmentoj precipe rilate la ordigon de valo de Tiso."*[7] En tiu li priskribas la instruaĵojn de siaj ekonomiaj kaj teknikaj studoj koneksajn kun la supraj spertoj, kaj la programon de la kreenda Tiso-vala Asocio – konforme al sia ĉie akcentita opinio pri la publika gvidado de la komunumaj aferoj, – kvazaŭ por preparado de la fonda kunsido de la Tiso-vala Asocio.

Tiu verko estas ne sole fundamenta dokumento de la historio de la Tiso-reguligo, kaj unu el la plej kompletaj resumoj de la hidrologia politiko de Széchenyi, sed ĝi estas ŝlosilo por kompreni lian ekonomi-politikon; krome ĝi speciale bone montras la teknikan bazigon de liaj ekonomi-teknika evoluigo.


Szerződvény.

La fondon de Tiso-vala Asocio fiksanta „Kontraktaĵo" (1846. jan. 26.)

La koncepto de *„Tiso-valo"* en la hodiaŭa senco aperis ĉi tie la unuan fojon en la hungara hidrologia literaturo! Laŭ lia percepto temas pri pli multo ol pri reguligo de *unu* rivero. La koncepto „Tiso-valo" laŭ li signifis ne sole la valon de Tiso kaj ĝian inundejon, sed konforme al la *de tiam* ĝenerale disvastiĝintaj principoj de la moderna akvoregulado *„ĉiujn fluejojn kaj inundajn ebenaĵojn de tiuj riveroj, kiuj fluas en Tison . . ."* La akvoordigado, kiel kompleksa tasko, kaj interne de tio speciale la nedisigebleco de la akvoregulado kaj inundopreventado aperis unue kaj nur pli poste ĝi estis menciata de Vásárhelyi: *„Ĝenerala Tiso-reguliga projekto."*

La broŝuro estas ne sole karakteriza Széchenyi-verko, sed unu el liaj plej grandsignifaj skribaĵoj. La kutima subjektivtona enkonduko kaj la pritraktadon sekvanta, ŝajne mozaikeca, „rapsodia" „Ideofragmentoj" en efektivo servas la plenecon de la montrita bildo, ĝi eklumi-

gas tre gravajn koneksojn kaj malkovras per severa logiko kaj klarvido ĉiujn fazojn de la problem-komplekso de Tiso-vala aranĝado: la teknikajn malfacilaĵojn prezentatajn de la geografiaj faktoroj sammaniere, kiel la malfacilaĵojn, taskojn – kaj ties komplikajn koneksojn, devenantajn el la historia paseo, el nia tiama primitiveco sur terenoj de ekonomio, politiko, juro, organizo kaj kulturpolitiko.

Klara montras tion la eksponado de la temo – la skizo de la pritraktado en resumigo de Széchenyi:*

„Rilate reguladon de Tiso-valo mi jene vidas la sekvajn malfacilaĵojn . . . 1-e Enorma akvokvanto, 2-e Rilate tro eta dekliveco. 3-e Pleje malalta bordregiono. 4-e Manko de merkato, pro kio nevendebla la superfluo. 5-e Senlaboreco (nome neutiligiteco de la laborforto). 6-e Eta valoro de la tero. 7-e Paradiza simpleco. 8-e Intereso de unu kontraŭ alia; kaj 9-e Eble sed nur eble, manko de popolmultiĝo."

„Kaj nun ni imagu la ĉi tie vicigitajn faktorojn en strikta ĉeno efikantaj unu sur la alia, kiel ili preskaŭ-

Akvopreno el Tiso



vere nedisigeble dependas unu en alia, kaj ni senprokraste estos konvinkitaj pri tio: ke la valo de Tiso ne estas aranĝebla per unu-du malĝustaj dekretoj, per laboro vola-nevola, per kelkaj mizeraj forintaĉoj, precipe dum mallonga tempo, sed ke por plenumado . . . de tiel grandega laboro . . . estas postulata eksterordinara forostreĉo kaj ĉefe harmonia ekmovigo de ĉiu materiala kaj spirita faktoro . . ."

„Kvankam multan progreson faris . . . en novaj tempoj la tekniko" . . . sed" *ke tiom da mavoj, kiuj ĉefe en la forfluintaj jaroj atingis en afero de la akvo grandan parton de la trans-Tisaj distriktoj estu preventataj radike per akvoinĝeniera lerteco, sen tio, ke tiu lerteco . . . trovas sian apogon en la entuziasma ŝultroĉe-ŝultro – kunlaboro, eĉ ankoraŭ en spirita evoluiĝo „. . . . tion kredi estus memtrompo, aŭ senorienteco. Rilate la teknikajn problemojn li atentigas precipe pri la problemoj de la teknika konstrukvalito: „. . . plej multo dependas de la aplikado . . . laŭcela aplikado povas regustiĝi eĉ la mankhavon de la planado . . ." „. . . tio faras antaŭ ĉio necesa, ke la ĉefplanisto, kiom tio eblas, estu ankaŭ ĉef-efektiviganto"* -t.e. li portu la plenan respondecon. Des pli, ĉar *„tiaspecan grandiozan planon, kiu sekvigus la ordigon de la Tiso-valo, anticipante, kaj en ĉiuj detaloj fininte, neniu en la mondo povus starigi . . . sole en la lerta uzado de ĉiuj-tiuj nenombreblaj cirkonstancoj povas atingi sian evoluintecon, kiuj pro la naturo de la aferoj kutimas aperi ĉefe dum la laboro, ol sur papero antaŭ la laboro . . ."* (Tial li deziris komisii al la projektinto Vásárhelyi ankaŭ la konstrulaboron – kaj tial estis nekorigebla perdo la morto de Vásárhelyi . . .)

La Orienta ĉefkanalo

Sur tiaj pripensoj li konceptis la senperajn kondiĉojn de la laboro jene:

„1-e Kompleta inĝeniera plano. 2-e Laŭeble plej granda unueco en la aplikado de tiu plano; kaj laŭ tio 3-e unu ordonanto kaj multaj obeantoj, 4-e preta kaso, 5-e Ĉiam vigla kaj strikte akordanta gardado en la bona konservado de la faritaj laboroj."

La „preta kaso", do por la kontinua laboro nemalhavebla kapital-sekurigo estas ĉi-loke tian akcentitan signifon, ke tio atestas, ke Széchenyi bone konis la kaŭzon kaj instruon de la malsukceso de pli fruaj akvolaboroj.

Kiel la citita skizo montras, Széchenyi ne restas sole ĉe la konigo de la kondiĉoj teknikaj kaj ekonomiaj. El tiu analizo atinganta ĝis la plej profundaj radikoj: *el la reciproka efiko* de la kredito, vartrafiko, biencirkonstancoj kaj de la kulturnivelo *en reciproka efiko* kreskas la konsumaj pretendoj. El la pritraktado de tiu problemkomplekso elvolviĝas la neceseco de forigo de feŭdismo kaj la perspektivo de la burĝa evoluo:

„. . . estas necesa por sukcesa plenumo de tiel ega laboro, kiel la ordigo de Tiso-valo kaj ties mirakla ĝardenigo, – la purigo de la tuta hungara konstitucia skizado, ties disdono al la tuta nacio, kaj en iuj aferoj perfekta renovigo . . ."

Széchenyi – kvankam klare vidis, ke la sukceso de la laboro dependis de eksterordinare multaj – kaj parte poste elformendaj faktoroj, opiniis ne sole ebla, sed rekte necesa la eluzon de la relative favora situacio, kaj la komencon de laboro – ne atendante la malrapidan kaj pigre progresan disponadon. Ĝuste tial, ĉar li sciis, ke en la intereso de la solvo de novspeca tasko oni povas krei konvena preparitajn kaj bone motivitajn leĝojn nur surbaze de konformaj praktikaj spertoj, aliparte ĉar – kiel li diris – inter niaj primitivaj cirkonstancoj estus neriparebla senagemo perdi pluran, nerevokeblan tempon . . .

Por la unueca aranĝado kaj ties centra direktado, sistema realigo, Széchenyi deziris krei tiun nepre necesan Tiso-vala Asocio-n en formo de strikta asocio-federacio pro la naturdonitaj cirkonstancoj kaj kunlige kun tio, pro pli-malpli grandaj diferencoj inter la interesoj kaj taskoj. Li intencis organizi ĉiun apartan asocion sendepende de la apartementaj ŝtatadministraj limoj, surbaze de natur-geografiaj, respektive de teknikaj donitaĵoj: laŭ eksperta propono konsiderante ok pli grandajn kompleksojn tn. „akvo-strukturo"-n t.e. bazeno- kaj konkavaĵo-grupojn. Tio samtempe respondis al laŭcele diferencigita ŝtata hidrologia administra kaj inspekta organizo, kiu respondis pli poste al la river-, respektive etapinĝeniera institucio.

(Daŭrigota en sekva numero)

Tr. A. *Pechan*

[1] La restaĵojn de la romia kluzo oni trovis en 1907.
[2] Ĉefe la jardekoj dum la dua kvarono de jc. 18a.
[3] prononcu: Seĉenji. Pri li v. ankaŭ HV 1978/1, 1979/2 (Hidr. kaj medioprot.) artikolojn, kaj ties piednotojn
[4] *aviticito:* nevendebleco de bieno heredita de prauloj (avoj)
[5] Pri Beszédes kaj *Vásárhelyi* v. HV 1979/2, 1978/1 Medioprotektado
[6] en Kredito, 87. paĝo
[7] en lia verko *Eszmetöredékek* (Ideofragmentoj, p. 60. ktp.)
[8] *„A balatoni gőzhajózás"* (La Balatona vaporŝiptrafiko), aperis en Peŝto, 1846
[9] *Szerződvény* (Kontrakto, 1846.)
[10] *Néhány szó . . .* (Kelkaj vortoj . . . 1834)
[11] *Lónyai M. visszaemlékezései* (Rememoroj de M. Lónyai, 1877)
[12] *Vélemény* (Opinio, 1846.)
[13] *esta:* (vidu Plena Gramatiko 3a eldono II. paragrafo 200/rim. II.) verbadjektivo de radiko *„est-"*

*laŭeble imitante lian tiutempan stilon arkaigintajn vortkunmetojn, voruzadon

PANNONIA









PANNONIA Eksterakomerca Entrepreno de UZINOJ CSEPEL

Budapest, VI., Bajza u. 26. 1062
Telegramadreso: PANEXPORT Budapest
Telefono: 228–850. Teletajpilo: 225128 PANEX–H
Poŝta adreso: Budapest, P. f. 354. 1394

•

Fajnmetalurgiaj duonfabrikaĵoj por telekomunikada tekniko, elektra kaj elektrona industrioj

•

Inkandeskaj elektrodoj kaj kablokerno por pretigo de elektrodoj de temperature regulita fandofitingo[2]

•

Ŝtaltuboj
Ŝtalboteloj por oksigeno ktp.
Bicikloj por sinjoroj, sinjorinoj kaj infanoj
Biciklo-konsistaĵoj

•

Maŝinoj por la konfekcioindustrio
– Elektraj tajladmaŝinoj
– Kudromaŝinoj
– Gladmaŝinoj
– Gladilaro
Specialaj maŝinoj kaj iliaj subtipoj

•

Maŝinoj por lavejoj kaj por la teksaĵpuriga industrio

•

Kompletaj konfekcio-instalaĵoj por teksaĵ- kaj led-konfekcio-industrioj

•

Kompletaj lavejoj kaj vestpurigejoj

•

Transportinstalaĵoj por konfekcio-fabrikoj kaj lavejoj

•

Prilabormaŝinoj por tuboj kaj stangoj
– Pintigmaŝinoj
– Tub-rektigaj, fleksaj maŝinoj
– Longigaŭtomatoj por tubo kaj stangoj

•

Spiraltub-veldejoj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por produktato de senfugaj tuboj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por ŝtalbotel-fabrikado

•

Maŝinoj kaj uzinoj por pretigo de arklum-veld-elektrodoj

•

Instalaĵoj kaj uzinoj por pretigi biciklo-konstruerojn, kaj por munti biciklojn

•

Konigo de Know-how[2] kaj teknologio, instrukcioj por fakpersonaro

[1] **fitingo** (PIV): kuniga interorgano (mufo, krano) de tubokondukiloj (por brulgaso, akvo); interĝustiga tubo, vaporkondukaj tuboj.

[2] **Know-how**: fabrikad-teknologio, »scii kiel«

A.P.

Szilárd Bálint

La dolĉa nupto

Johano Beke edziĝis al Anna Vas. La juna paro volis pasigi la nuptan semajnon en Grekio. Ili pagis la kotizon al la Fremdultrafika Oficejo, kiu certigis por ili unu-semajnan grupan vojaĝon. La grupo konsistis el tridek personoj diversaĝaj.

La unua loko en Grekio estis Tesaloniko, la tn. „Reĝino de Nordo" ĉe la bordo de Egea-maro. La brila, vigla, vivdezira kaj frekventata havenurbo gardas multajn Bizancajn memoraĵojn. Sur la larĝaj bulvardoj ondis la homamaso, diverslandaj maristoj, turistoj kaj kompreneble la loĝantoj. En la montrofenestroj estis videblaj oraj kaj arĝentaj juveloj, puntoj kaj artaj kopioj de helenaj memoraĵoj. Al la maro kondukantaj stratetoj estis plenŝtopitaj kun multaj malkonfidindaj marist-drinkejoj. Sed ĉe la bordo de la blua maro estas neĝblanka vico de elegantaj hoteloj.

Anna kaj Johano ricevis belan dulitan ĉambron en la hotelo Olimpo kun florornamita balkono al la direkto de la maro. Ili ambaŭ estis lacaj pro la longa vojaĝo, pro la multaj buntaj spertoj antaŭ la nupta nokto. Unu post la alia aparte ili iris al la banĉambro kaj ŝanĝis vestojn por partopreni la komunan vespermanĝon. Ce la kvarpersona blanka tablo jam sidis mezaĝaj virino kaj viro el inter la grupvojaĝantoj.

– Ha, vi estas nuptovojaĝantoj – diris la viro post la prezentiĝo – tiu afero estas ege interesa . . . mi jam trifoje estis edziĝinta . . . ĉiun fojon mi faris belegan nuptovojaĝon . . . nun mi prezentas al vi mian kvaran fianĉinon, kiun proponis al mi mia unua eksedzino kun kiu ni tenas la amikecon . . . do ni trinku je nia sano . . . – vortgalopis la viro.

Anna kaj Johano rigardis unu la alian kaj pensis pri tio, ke estus bone jam enlitiĝi, sed la viro post la vespermanĝo proponis, ke ili kune iru al la dancejo, dirante, ke oni devas fruktuzi ĉiujn horojn de la vivo. Dum la danco Anna preme alteniĝis al la viro kaj dume sonore ridis. Johano mispaŝinte faris la necesajn paŝojn de la danco kun la silentema fianĉino. Johano ĉiam pli koleris kontraŭ la viro kaj Anna, kaj ofte trinkis. Fine matene je la kvara li estis iom ebria, kiam ili reiris al la hotel-ĉambro. Anna ridis kaj zumkantis la melodiojn de la danco. Johano estis furioza, kiam Anna volis doni al li kison, li forpuŝis ŝin kaj diris:

– Fiaĵo! Manke de la donĵuano, vi volonte donus vin al la legitima edzo . . . tute ne proksimiĝu al mi . . . vi malfideliĝis en miaj okuloj!

Anna diris nenion, sed komencis mallaŭte ploreti. Fine ili turnis la dorson unu al la alia en la larĝa franctipa dupersona lito, kaj ili ambaŭ pensis pri la forrestinta nupta nokto.

Postan matenon ĉe la matenmanĝo ili ne renkontiĝis kun la donĵuano, tiu kun la fianĉino sidis ĉe alia tablo. En la juna paro komencis mildiĝi la streĉa kolero. Unue ekparolis Johano:

– Estus bone, se ni irus al la maro por baniĝi . . . ĉu ne?

– Kiel vi volas . . . – respondis Anna.

Poste kuŝante sur la velurglata sablo ili rigardis la foriĝantajn blankajn ŝipojn, eĉ en la sekvaj minutoj ili manpreme kapriolis en la varmeta maro. Anna ĉirkaŭprenis la kolon de Johano kaj flustris:

– Ĉu vi ankoraŭ koleras pri mi?

– Tute ne . . . mia kara . . . post la tagmanĝo ni ripozos en la lito . . .

Tagmeze la tablokunuloj estis maljunaj viroj, kiuj konstante disputis pri la diversaj gastropodoj de la maro. Dum la tagmanĝo la gvidantino de la grupo anoncis, ke la aŭtobuso alvenis kaj la tuta grupo post duonhoro veturos plu. Ĉiu partoprenanto klopodu esti preta. Anna kaj Johano denove rigardis unu la alian.

Dumvoje al la urbo Delfio la vojaĝantoj ekvidis la Olimpon, la iaman loĝlokon de Zeŭso kaj la multaj grekaj dioj. Unu flanko de la vojo estis la sunplena maro, aliflanke inter la altaj montoj estis videbla la verdeta pinto de Olimpo kaŝiĝinta inter la blankaj nuboj. La aŭtobuso pene grimpis ĉiam pli alten, fine inter la malkontinuaj montoj en la profunda valo oni ekvidis la sanktejon kaj divenejon de Apolono. La mistika loko estis oportuna por mistifiki la kredulojn. La interpretisto rakontis, ke la pastroj havis ampleksan agento-reton, kiuj kolektis la personajn indikojn, kiujn la pastroj notis sur ŝliparoj kaj helpe de tio diris aŭguron la divenistino.

Denove ekiris la aŭtobuso, Anna ripozigis sian kapon sur la ŝultro de Johano kaj flustris:

– Ni havos kvar noktojn en Ateno . . . kaj ni ne iros danci . . . sed hejme . . . en la lito . . .

– Jes . . . mia kara . . . – aprobis Johano.

Fine ili alvenis en Ateno; la aŭtobuso haltis meze de la svarmanta, vigla, bunta urbo, en la Omonia placo. La grupanoj restis kaj la grupgvidantino impete gestadis kun greka viro. Poste ŝi diris:

– Mi ege bedaŭras . . . sed nia hotelo estas okupita, ĉar iu angla grupo restas plu, tial ni devas iri al alia hotelo . . .

– Ne estas granda afero! – diris kelkaj homoj el la grupo.

La aŭtobuso denove ekis kaj post sufiĉe longa vojo haltis antaŭ duetaĝa domo.

– Bedaŭrinde ni ne povas doni dulitan ĉambron por la geedzaj paroj, ĉar ĉi tie ekzistas nur kvinlitaj ĉambroj . . . tiamaniere aparte estos lokigitaj viroj kaj virinoj . . . – diris melankolie la grupgvidantino.

Malrapide paciĝis la granda indigno de la grupanoj, kaj aparte virinoj kaj viroj kverele serĉis la plej bonajn litojn en la komunaj ĉambroj.

Postan tagon Anna kaj Johano brako en brako observis la grandan amason de diverslandaj turistoj ĉe la piedo de Akropolo, kaj ĉagrenite aŭskultis la klarigon pri tio, ke iam ĉiun urbon kaj fortikaĵon oni nomis akropolo. En la spirito de Anna kaj Johano grandega sopiro vekiĝis por kunpremiĝi en granda amo.

La duan tagon ili ankoraŭ vizitis la templon de diino

Petrolminado en Hungario



La uzino de Hajdúszoboszló

Depost la invento de la eksplodmotoro – fare de la germana inĝ. DIESEL – la petrolo estas baza faktoro de la teknika evoluo. Tio profunde influis eĉ la vivon de pluraj popoloj.

En favora situacio troviĝas tiuj ŝtatoj, kiuj – pro siaj geografiaj situoj – posedas grandajn kvantojn da petrolo. Hungario ne apartenas al tiuj landoj, tamen ni posedas iom da „nigra oro" kaj la propra petrolminado estas ne neglektinda faktoro de la nacia energiomastrumado. Sed unue ni jetu rigardon al la pasinto.

La „Anglo-Persian D'Arcy Exploration Co. Ltd.", ricevinta koncesion de la tiama hungara registaro, komencis la petrolesplorojn en Transdanubio (okcidenta parto de Hungario), en la j. 1920. Tiuj esploroj, senrezultaj, ĉesis en 1924. Post 9 jaroj la angla „European Gas and Electric Co." daŭrigis la esplorojn sur la sama regiono, sen menciinda rezulto.

Dum la jaroj 1924–1937 per financa dispono de la hungara fisko okazis esploroj sur la teritorio, situanta inter la riveroj Danubo kaj Tibisko (Tisza). Laŭ la tiamaj teknikaj ebloj la esplor-boradoj atingis la prfodundeconde 1000–1500 metroj. Dum la menciita periodo la esploroj portis malgrandan produkton de tergaso. Tamen, tiuj esploroj ne estis vanaj, ĉar sekve de la esplor-boradoj estis trovitaj pluraj varmaj kaj sanigefikaj akvofontoj, per kiuj estas nutrataj kuracbanejoj famekonataj, eĉ nuntempe funkciantaj. Tio signifas valoran naturtrezoron por Hungario, el ekonomiaj kaj sanitaraj vidpunktoj.

En aprilo de la j. 1937 la fakuloj komencis pliprofundigi la boradon ĉe la plifrue starigita laborloko nomata „Budafa–2" kaj post 5 monatoj, la 21-an de novembro ekspruĉis la petrolo, unuafoje en Hungario. Tiu puto produktis komence po 45 tunojn, da petrolo kaj 420 mil kubmetrojn da tergaso – tage. Do, tiu dato estas konsiderata la naskiĝtago de la hungara petrolminado. Sekve de tiu sukceso, en la j. 1938 fondiĝis miksa kompanio nomita MAORT (Hungara-Amerika Petrolindustria Akcia Societo) la jura ido de EUROGASCO. Ekspluatado de la kampo Budafa daŭris kun rapida elano. Du jarojn poste (1940) troviĝis petrolkampo ĉe la vilaĝo Lovászi kaj poste (1942) – kun iom malpli granda kapacito – ankaŭ ĉe la vilaĝo Pusztaszentlászló. Ĝis fino de la dua mondmilito, la hungara petrolindustrio baziĝis sur tiuj tri petrolkampoj.

La hungara registaro donis koncesion – en 1939 – al MANÁT (Hungara-Germana Petrolindustria Kompanio). Fine de la dua mondmilito la bararanĝoj, investitaj de MANÁT, restis grandparte sur la esplorlokoj, dum plimulto de la maŝinaro kaj rezerva materialo – posedaĵo de ONÁRT – estis transportita al Aŭstrio (Usona zono). Tiujn teknikajn instalaĵojn poste la hungara registaro ne sukcesis rehavigi. Malgraŭ tiuj faktoj MAORT ekspluatis en la j. 1945 – helpe de soveta kontribuo – 656 mil tunojn da petrolo. (Dum la antaŭa jaro la produkto estis 809 mil tunoj.)

Post la milito la direktadon de la petrolminado en Transdanubio transprenis denove la MAORT. Pro manko de la necesaj investoj la petrolproduktado reduktiĝis – en 1948 – ĝis 488 mil tunoj. Tial la hungara registaro alŝtatigis MAORT en la j. 1949. Post la alŝtatigo pliiĝis la produktado, nome en majo de 1952 la fakuloj sukcesis ekspluati novan petrolkampon – kun pli granda kapacito ol la ĝistiamaj kaj – en 1941 – al ONÁRT (Itala-Germana Petrolindustria Akcia-Societo) por daŭrigi esplorojn en la sudorienta, resp. sudokcidenta parto de Hungario. La fakuloj de ONÁRT ekspluatis tergason en relative granda kvanto, kaj ankaŭ malgrandan kvanton da petrolo, en la ĉirkaŭaĵo de vilaĝoj Tótkomlós kaj Körösszegapáti.

Daŭrigo de paĝo 112

Athene, la Partenonon konstruitan el marmoro. Ili komencis enui la tutan urbon kun la multaj reklamoj de la miliardulo Onassis, ĉar preskaŭ ĉie estis trovebla marknomo: „Olimpic".

La trian tagon en la „Agora" (vendoplaco) frumatene Johano luis du piajn azenojn, per kiuj ili rajdis el la urbo al iu fora deklivo, kie ne estis svarmanta amaso, sed alta greso, granda trankvilo, lazura ĉielo, brilaj sunradioj kaj la juna paro sub figarbo volis uzi la nupton. Ili esperis, ke anstataŭ nupta nokto okazos nupta tago en Grekio, kie la du azenoj kun flegmo rigardis la nekutiman preparĝon.

Sed . . . dum la sekvaj minutoj el la alta greso elstaris eĉ pli alta policisto kaj per nekomprenebla lingvo gestadis, montrinte la nemiskompreneblan malĉastecon. Spite de energia protesto la policisto forkondukis s-inon Anna al sur la vojo staranta police aŭto kaj ili rapide forruliĝis al la direkto de la urbo. Poste la malfeliĉa Johano kun la du azenoj ĉagrene vagadis reen al la urbo . . .

Kara Leganto! La redakcio pretendas vian helpon por mallonge fini la historion. Ni scivolas: kiel aranĝiĝis la polica afero kaj kie okazis la dezirita nupto? La sendinto de la plej bona solvo ricevos libropremion, kaj la teksto aperos en Hungara Vivo.

– ĉe la vilaĝo Nagylengyel. Sekve – en 1955 – la hungara petrolminado produktis 1,6 milionojn da tunoj.

La Soveta-Hungara miksa entrepreno – fondita en 1946 – faris esplorojn sur la Granda Ebenaĵo (Orienta parto de Hungario) kun malgrandaj rezultoj.

En la j. 1957 fondiĝis Hungara Petrolindustria Trusto, kiu poste – en 1960 – transformiĝis je Hungara Petrol-kaj Gasindustria Trusto. Ĝi estas centra entrepreno de la hungara petrolindustrio.

Produktado de petrolo en Hungario – ekde 1963 – varias inter po 1,7–2,0 milionoj da tunoj jare. La produktado de nigra petrolo (nome de fluida produktaĵo, filtrita el tergaso) atingis – en 1978 – la nivelon de 2 milionoj da tunoj. Tiu kvanto – pro la rapide kreskantaj pretendoj de la Hungarlanda industrio, agrikulturo, trafiko (kaj tio de la loĝantaro) – povas kontentigi la kvinonon de la tutlandaj bezonoj. Konklude, Hungario devas importi petrolon. Tion disponigas grandparte Sovetio tra la petrol-kondukilaro nomata „Szabadság" (Libereco).

Kompreneble la esploroj daŭras senĉese inter esperigaj cirkonstancoj.

Interesa, en la historio de la hungara petrolminado unika evento elvokis la atenton de multaj homoj, legintaj informojn, publikigitajn antaŭ kelka tempo en hungaraj tagĵurnaloj. Tiuj sciigoj informis pri novsistema procedo, aplikita en la petrolminado. Ĝi bone prezentas kaj la evoluon de la petrolminad-teknologio, kaj la altnivelan fakscion de la hungaraj petrolministoj. Pri kio do skribis la ĵurnalistoj? La petrolkampo, ekspluatita ĉe vilaĝo Algyő, situanta apud la urbo Szeged etendiĝas ĝis la teritorio de Szeged. La fakuloj – konstatinte ekziston de petrolo sub la urbo – faris projekton, kiamaniere ekspluati ĝin. Por eviti eventualajn detruiĝojn de la konstruaĵoj starantaj en la urbo – la ministoj aplikis *oblikvajn borojn* anstataŭ la tradicia vertikala metodo. Tiamaniere la boriloj penetris – laŭ 30–40 grada descendo – sub la urbon. La boriloj, starigitaj diversloke sur 20 laborpunktoj, proksimiĝis al la petrolhavaj tavoloj kaj en profundo de 2000 metroj troviĝis konsiderinda kvanto da petrolo. Antaŭ tiu ekspluato la loĝantoj de Szeged ne pensis eĉ en siaj sonĝoj, ke ili vivas super petrolkampo. Tiu petrolkampo – kune kun tiu de Algyö – plenumas la plej abundan petrolproduktadon nuntempe en Hungario.

Lajos *Kapitány*



Petrolrafinejo en Zalaegerszeg

Kompresora uzino sur la petrolkampo de Szeged



Eksperimenta petrolekspluatado en Kiskunhalas



Kiel mendi Esperantajn librojn?

Pluraj esperantistoj el diversaj socialismaj landoj demandis nin, kiamaniere ili povus mendi Esperantajn librojn, eldonitajn en Hungario? Ekzistas pluraj ebloj por tio. En Sovetio – kiel tion ni plurfoje jam spertis –, tiajn mendojn akceptas la reto de lbirovendejoj *Druĵba,* kiu havas filion en ĉiuj iom gravaj urboj. Ekz. en Leningrado akceptas mendojn librovendejo, specialiĝinta pri eldonaĵoj de socialismaj landoj (kvankam ne havanta la nomon Druĵba). Ĝi troviĝas sur *Nevskij prospekt,* tre proksime al la rivereto *Mojka.*

En aliaj socialismaj landoj oni turnu sin al librovendejoj de hungaraj kulturaj centroj. HEA interkonsenis kun ili pri akceptado de mendoj, kaj se ili ricevos tiajn mendojn iom grandkvante (do, almenaŭ 15–20 esperantistoj faros konkretajn mendojn), ili pretos ankaŭ teni stokon de Esperantaj libroj, aŭtomate kompletigante ĝin per novaperaĵoj. Do, se troviĝos kelkaj, iom organizemaj esperantistoj en la subaj landoj, tre facile estos atingebla la konstanta liverado de niaj eldonaĵoj. Jen, adresoj de hungaraj kulturaj centroj en kelkaj socialismaj landoj:

Pollando:
Wiegerski Institut Kultury
WARSZAWA, ul. Marszalkowska 60.
Ĉeĥoslovakio:
Madarské Kulturni Stredisko
PRAHA–1, Rytirska 25. CS–110 00
Germana Demokratia Respubliko:
Haus der Ungarischen Kultur
BERLIN, Karl-Liebcknecht-Strasse
Bulgario:
Ungarski Kulturen Centar
SOFIA, Bul. Ruski 8.

Ĉe la mendo oni devas indiki la sekvajn datojn: *nomo de la aŭtoro, titolo de la libro, nomo kaj adreso de la eldonejo, eldonjaro, ISBN-numero.* La eldonejo de ĉiuj libroj (krom de la lastaj du) estas *Hungara Esperanto-Asocio (H–1368 Budapest, Pf. 193).* La lastajn du titolojn eldonis *Tankönyvkiadó (Budapest, V. Szalay u. 5–7.).*

Por doni imagon ankaŭ pri la atendebla prezo de la libroj, en la ĉi-suba listo ni aldonas ankaŭ prezon en forintoj, laŭ kiuj la libroeksporta kompanio kalkulos la vendoprezon por socialismaj landoj. Ĝenerale aldoniĝas 10–20%-a pluspago, krom en Sovetio, kie – dank' al subvencio fare de la soveta ŝtato –, la vendoprezoj fariĝas malpli altaj, ol la prezoj en forintoj.

Jen, la listo de Esperantaj libroj, mendeblaj el Hungario:

1. Ferenc Molnár: **La knaboj de Paŭlo-strato** *(Romano, 180 p.)*
   Prezo: 50,– Ft; Eldonjaro: 1978; ISBN 963 571 039 9
2. Mór Jókai: **La filoj de l' ŝtonkora homo** *(Bildrakonto, 64 p.)*
   Prezo: 18,– Ft; Eldonjaro: 1978; ISBN 963 571 038 0
3. Izrael Lejzerowicz: **El la „Verda Biblio"** *(Satiroj, 80 p.)*
   Prezo: 35,– Ft; Eldonjaro: 1978; ISBN 963 571 036 4
4. **Programdeklaro de la Hungara Socialisma Laborista Partio** *(41. p.)*
   Prezo: 5,– Ft; Eldonjaro: 1978; ISBN 963 571 034 8
5. Endre Ady: **La morto de la ĉielarko** *(Poemoj kaj artikoloj, 90 p.)*
   Prezo: 40,– Ft; Eldonjaro: 1977; ISBN 963 571 028 1
6. F. V. Dorno: **Satiroj** *(Satiro kaj krimkomedio, 140 p.)*
   Prezo: 45,– Ft; Eldonjaro: 1977; ISBN 963 571 009 7
7. S. Szathmári: **Kain kaj Abel** *(Rakontoj, 290 p.)*
   Prezo: 70,– Ft; Eldonjaro: 1977; ISBN 963 571 006 2
8. W. Auld–V. Benczik: **25 jaroj** *(Originala antologio, 208 p.)*
   Prezo: 60,– Ft; Eldonjaro: 1977; ISBN 963 571 005 4
9. J. Baghy: **En maskobalo** *(Unuaktaĵoj, 140 p.)*
   Prezo: 45,– Ft; Eldonjaro: 1977; ISBN 963 571 003 8
10. F. Szilágyi: **Koko krias jam** *(Novelaro, 200 p.)*
    Prezo: 60,– Ft; Eldonjaro: 1976; ISBN 963 571 000 3
11. Auld–Dinwoodie–Francis–Rossetti: **Kvaropo** *(Poemaro, 252 p.)*
    Prezo: 70,– Ft; Eldonjaro: 1977; ISBN 963 571 002 X
12. L. Tárkony: **De paĝo al paĝo** *(Eseoj, 121 p.)*
    Prezo: 45, – Ft; Eldonjaro: 1976; ISBN 963 571 001 1
13. D. Blanke: **Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado** *(Studoj, 228 p.)*
    Prezo: 60,– Ft; Eldonjaro: 1978; ISBN 963 571 035 6
14. A Pechan: **Gvidlibro por supera ekzameno** *(Historio, literaturo, metodiko, 362 p.)*
    Prezo: 40,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571 031 3
15. V. Benczik: **Baza Literatura Krestomatio** *(262 p.)*
    Prezo: 35,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571 044 5
16. I. A. Krilov: **111 fabloj** *(136 p.)*
    Prezo: 50,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571 043 7
17. Gy. Krúdy: **La rozo de l' sultano** *(Fabelo, 48 p.)*
    Prezo: 20,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571 042 9
18. G. Gárdonyi: **Steloj de Eger** *(Bildrakonto, 64 p.)*
    Prezo: 18,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571 054 2
19. F. Karinthy: **Vojaĝo al Faremido – Kapilario** *(Du romanoj, 210. p.)*
    Prezo: 60,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571 045 3
20. E. Tóth: **Lappar, la Antikristo** *(Novelaro, 148 p.)*
    Prezo: 50,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571 048 4
21. Zs. Móricz: **Malriĉaj homoj** *(Rakonto, 36 p.)*
    Prezo: 12,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571
22. G. Gárdonyi: **Sklavoj de Dio** *(Romano, 409 p.)*
    Prezo: 60,– Ft; Eldonjaro: 1972;
23. **Turista Kantaro** *(84 p.)*
    Prezo: 24,– Ft; Eldonjaro: 1976;
24. P. Rados: **Hund-bazaro** *(Porinfanaj poemoj, 80 p.)*
    Prezo: 40,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571 041 0
25. L. Kökény–V. Bleier: **Enciklopedio de Esperanto I–II.** *(Represo, 620 p.)*
    Prezo: 220,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571 051 8
26. **133 tagoj** *(Artikolaro pri la Hungarlanda Konsilia Respubliko, 244 p.)*
    Prezo: 45,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571 033 X
27. E. Benedek: **Hungaraj Fabeloj** *(10 fabeloj tradukitaj, 100 p.)*
    Prezo: 40,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571 061 5
28. K. Kalocsay: **Pri la Esperanta rimo kaj ritmo** *(Du studoj, 36 p.)*
    Prezo: 5,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571 047 X
29. I. Szerdahelyi: **Praktika Gramatiko de Esperanto I.** *(110 p.)*
    Prezo: 40,– Ft; Eldonjaro: 1979; ISBN 963 571 057 5
30. V. Benczik: **Serĉoj, rakojtoj** *(Legolibro, 104 p.)* (Eld.: Tankönyvkiadó)
    Prezo: 4,– Ft; Eldonjaro: 1974;
31. V. Benczik: **La kato en la sako** *(Legolibro, 133 p.)* (Eld.: Tankönyvkiadó)
    Prezo: 6,– Ft; Eldonjaro: 1978; ISBN 963 17 3305 X

Tri libroj ne havas ISBN-numeroj, ĉar tiu sistemo ankoraŭ ne funkciis en Hungario, kiam ili aperis.

Ni esperas, ke troviĝos agemaj esperantistoj, kiuj ne nur mem mendos la librojn, por kiuj ili interesiĝas, sed konsilos ankaŭ al siaj amikoj fari same. Tio havus trioblan utilon: ili rapide kaj senceremonie povus certigi por si konstantan alvenadon de Esperantaj libroj, grave helpus al ni regajni la monon, kiun ni investis es tiujn tridek librojn, kaj fine konsciigus gravan neesperantistan medion pri la vivado kaj funkciado de la Internacia Lingvo.

recenzoj - recenzoj - recenzoj

Auld kiel eseisto

Pri lingvo kaj aliaj artoj de William Auld. Eldonis: TK Ŝtafeto, Antverpeno-La Laguna, 1978. 213 p., 21 cm. Prezo: 18,– ned. gld.

Estas sendube, ke W. *Auld* dum la lastaj du jardekoj kreskis la centra figuro de la Esperanta kulturo, kia estis en la tridekaj jaroj *Kalocsay*. Ambaŭ granduloj kreis temprezistan originalan poezion, omaĝis al siaj naciaj literaturoj per admirindaj tradukoj, kaj kuraĝe malfidelis iom al la literaturo, kiam la bezonoj de nia kulturo necesigis tion: Kalocsay dediĉis multan tempon al la gramatiko, Auld verkis brilajn lernilojn.

Tamen, ni povas noti ankaŭ diferencojn inter la hungaro kaj skoto. Kalocsay neniam elpaŝis el la sfero, kiun oni nomas – en strikta senco – kulturo, dum Auld havis ĉiam fortan socian orientiĝon. Lastatempe li eĉ akceptis movadan postenon: li estas vicprezidanto de UEA.

Ŝuldiĝas precipe al tiu socia orientiĝo, ke la kolekto de liaj eseoj pri lingvo kaj literaturo estas aparte valora kaj utila verko por ŝatantoj de la Esperanta kulturo. Lingvo kaj literaturo en Esperantujo ĝis nun preskaŭ ĉiam estis esploritaj el vidpunktoj esence ne-sociaj kaj ne-homaj. Logiko, objektivema lingvistiko superregis ĉion.

Auld provas ion alian. Jam la titolo antaŭpromesas tion: Pri *lingvo* kaj aliaj *artoj*. Estas iom surprize nomi lingvon arto, sed repensante la aferon, oni ne povas ne konsenti kun la aŭtoro.

Jam la unua eseo, *Mitoj kaj faktoj pri Esperanto* preterlasas la kutimajn „sciencajn" rekvizitojn, kaj serĉas la kaŭzojn de la psikologiaj kaj aliaj antaŭjuĝoj kontraŭ la IL. Lia argumentado estas logika, kaj, kio pleje gravas, neniam ĝi forŝiriĝas de la realaj spertoj: la leganto povas nur senĉese kapbalanci – fakte li vidas surpaperigitaj siajn proprajn latentajn, sed neniam konceptitajn pensojn.

Ankaŭ en pluraj aliaj eseoj *(Pri la tradukado de poezio, Konturoj de poezio kaj belartoj, Belartoj en la 20-a jarĉento* ktp.). Auld insistas fakte pri unu penso: nome, ke lingva elvokiveco, artismo, impreskapablo estas aferoj home kondiĉitaj, ilia ekzisto aŭ neekzisto dependas de ni mem. Do, estas sensence nei eblan artismon de la Esperanta literaturo, kiam almenaŭ dekmilo da homoj kapablas ricevi estetikan ĝuon per esperantlingva artverko.



Du eseoj tuŝas iom pli konkrete – kaj iom amplekse – la Esperantan literaturon: *Pasivo – Pasio* omaĝas al la soveta esperantista poeto E. *Miĥalski*, kaj alia verko (kiu en embria formo aperis en la n-ro 1974/3 de HV), *La evoluo de la esperanta poezio* estas sinteza superrigardo pri la plej granda fieraĵo de nia kulturo.

Kvankam preskaŭ ĉiuj pecoj de la kolekto aperis pli frue jam en revuoj, la libro tamen estas fortefika kaj nova: la opaj eseoj kvazaŭ faras pli emfaza unu la alian. Estas nepre menciinda la agrabla stilo de la verko, kiu certigas, ke ĝin ĝue legos ne nur malgrandan rondo de specialistoj, sed espereble ĉiuj esperantistoj, kiuj estas *vere* ligintaj sin al la afero de la Internacia Lingvo.

V. *Benczik*

EINEN

Erevono. Utopia satira romano de Samuel Butler. El la angla tradukis kaj eldonis Alec Venture. London, 1978. 177 p., 22 cm. Prezo: 12,– ned. gld.

La aventure vivinta aŭtoro en tiu ĉi libro konstruis grandiozan, Swift-modelan satiron pri la angla socio en la longa Viktoria-epoko. Laŭ la multflankaj verkistaj manieroj de sia granda antaŭulo, talente uzitaj de Butler, tiu „utopia" romano ridindigas kaj kritikadas arondaj sociaj facetoj, kiuj kompreneble ekzistis kaj aĉis ankaŭ en aliaj burĝaj socioj, por ne malproksime trovi ekzemplon, ankaŭ en la Franz-Jozefa Monarkio. En la Nenieslando, aŭ imitante la titolon renversitan de *Nowhere*, „Einen", en lando renversita, ĉiu homa afero prezentiĝas renverse. Butler senindulge montris al la tiuempa socio nudan esencon de siaj kutimoj, institucioj, la fundamentan stultaĵon kaj hipokritecon, same la preman atmosferon, sub kies influo eĉ la senpeka viktimo akceptas natura la viktimiĝon – la fremdiĝon de si mem. La malsano tie estas konsiderata granda krimo, sed la krimojn (de la ĉiuloj) oni kuracas terapie. Malavantaĝa maskiĝo estas – ĉervere – en tiuj socioj ĉiuvazaŭ propra krimo de la mizerulo, kun siaj konataj konsekvencoj,. kaj la reganta burĝa moralo igas tiujn konsekvencojn vidi tute normalaj eĉ en okuloj de mizeruloj. Ne mirinde, ke tiu amara satiremo forte efikis je Bernard *Shaw*, en kies verkoj oni same trovas la elirpunktojn en renversitaj situacioj, kies fonto originas el la Gullivera kontrastiga metodo. La eltrovo de Butler por elturni la anglan edukadosistemon: la kolegioj de la *mal*racio, povus esti jam apenaŭ pli mordaj por piki sur tabulon la malhumanan manipuladon de junaj animoj. Profunde spritas la satira desegnado de la eklezio, de la ŝajne religia sinteno de la „bona societo": la *muzikaj bankoj*, kie oni naive pagas per ŝajn-mono, preĝoj kaj similaj, kaj kompreneble sammaniere estas repagataj de la „bankdirektoroj" nigre uniformitaj, kaj tamen ĉiu devas *konsideri* la pagojn valoraj, kvankam *scias* pri la ŝajn-valoro. Ridindega estas tiu konfuza mondo senracia, kie la aferoj staras surkape – diras la kritika, ataka direndo de la granda angla satiristo. Roman-iloj, amhistorio, aventuroj kaj geografiaj priskriboj, verŝajne de Nov-Zelando, kaj precipe la elokvente skizitaj amuzaj figuroj, karakteroj helpas al la leganto sin pli bone amuzi inter la – ofte – filozofiemaj meditadoj de la heroo-aŭtoro. Alec *Venture* utiligis ĉian lingvan kapablecon de Esperanto por plej fidele respeguli la originalaĵojn de la verko, foje eble tro fidele, por la nuntempa legantaro. El liaj vort-kreaĵoj, esprimmanieroj uzi por siaj verkoj, estos dezirinda ago de niaj prozistoj.

Ervin *Fenyvesi*

recenzoj - recenzoj - recenzoj

La perdita ravo de Heinrich Böll

La perdita honoro de iu Katarino Blum' de Heinrich Böll. Rakonto. El la germana tradukis Rikardo Ŝulco. Eld.: Bleicher Verlag – Edition Leipzig. 154 p., 19,5 cm. Prezo: 16,– ned. gld. (Por Hungario: 55,– forintoj.)

La Nobel-premiita okcident-germana verkisto, *Heinrich Böll* estas tiom precizema, ke ankaŭ ni plipreciz igu la difinon pri la ĝenro de lia verko: *La perdita honoro de iu Katarino Blum'* estas neniel rakonto, sed ia transira formo inter fikcia kaj dokumenta romano. Ĝi ne estas senmanke fikcia, ĉar Böll mem, per sia propra haŭto spertis Zeitung-tipan kalumnian kampanjon, ekstreme, histerie kaj malsaĝe antikomunisman. Kaj nek senmanke dokumenta ĝi estas, ĉar legante ni ĝuas – en pure literatura senco – memfermitan, memvalidan historion, en ĉiuj aspektoj „nivelitan" laŭ la vortoj de l' verkisto –, kies ĉefrolanto, Katarino estas sangoplena, tridimensia persono, plurnuance, epike karakterizita.

Nature, literaturajn verkojn en sia valideco ne enfluas la etikedoj, kiujn oni algluas al ili. Tamen, en la kazo de la Böll-romano gravas emfazi ĝian kvazaŭ-dokumentecon, ĉar ĉi tie absolute ne temas pri okazebla historio en ia ajn lando, sed pri „kiel potenco povas estiĝi kaj kien ĝi povas konduki" – laŭ la subtitolo – en konkretaj sociaj cirkonstancoj de difinita lando, kie la publikan opinion formas kaj influas ankaŭ malmorala, la homan dignon malestimanta gazetaro, apoganta sin sur la de tempo al tempo kontraŭmaldekstrula socia atmosfero. Katarino Blum' estas tre energia, simpatia juna virino, kiu sole, pere de multaj penadoj kaj senĉesa, konscienca laboro sukcesis konstrui ĉirkaŭ si firmajn murojn kontraŭ la ekstera socio, kaj interne de la muroj ŝi vivas kiel sendependa persono, honeste, serĉante – finfine – feliĉon. Tiun honoron forrabas de ŝi ĵurnalisto, publikigante en la „Ĵurnalo" mensogajn riportaĵojn, fie malhonorigantajn Katarinon antaŭ la publiko. Neniu kapablas defendi Katarinon, tial ŝi defendas sin mem, pafmurdante la aĉan jurnaliston.

La romano meritis esti tradukita en la Internacian Lingvon. Tiel opiniis la eldonejo kaj la tradukinto, kaj tute prave. Sed ili, ŝajne, ne priatentis, ke *La perdita honoro* . . . reprezentas literaturan ĝenron senprecedencan en la Esperanta literaturo, kaj profunde individuan stilon, kies rekreo en Esperanto postulas absolutan stilsenton de tradukisto kun eble verkistaj talentoj. Bedaŭrinde, Rikardo Ŝulco (tiel!) ne sukcesis en tiu senco. Videblas, ke li tre konscience kaj humile provis imiti la perfekte, dokumentece objektivan, tamen sentoplenan stilon de Heinrich Böll, sed vane, senrezulte. La teksto plenplenas je misaj frazkonstruoj, kelkfoje tre malfacile kapteblaj, je trokomplikigoj de la kompleksaj verboformoj, je kelkaj strangaj vortelektoj kaj vortkunmetaĵoj. Jam la titolo estas erarige tradukita: ĉi tie ne temas pri „iu Katarino Blum' ", sed pri tre konkreta, unusola Katarino Blum'. Tiu eta vorto „iu" mistifikas la realecon de l' historio, krom tio, ke ĝi ŝajne netroveblas en la originala titolo. Kaj kial *Katarino*, kaj ne *Katarina?* Kvazaŭ reviviĝus la Zamenhof-epokaj *Marto*-j kaj *Heleno*-j . . . La -a-finaĵaj virinaj nomoj estas jam akceptitaj kaj ĝenerale uzataj. Kaj kial Blum', anstataŭ, simple, Blum? Ankaŭ eksmode. Kaj la iom ridindaj transliterigoj de la germanaj nomoj: *Boelo* (Böll), *Tojtgeso* (Tötges), *Ŝtrojbledo* (Sträubleder), *Ŝojnero* (Schönner), *Oftersbroĵho* (Oftersbroich), ktp. ankaŭ tre ĝenas, ili perfortas la lingvan muzikon de Esperanto. Civitano de kiu ŝtato povas esti, ekzemple, Alojzo Ŝtrojbledo? Bonŝance, tamen, ke sur la titolpaĝo la nomo de l' aŭtoro ne aperas kiel „Henriko Boelo" . . .

Jen: el brila verko de Nobel-premiita verkisto naskiĝis, bedaŭrinde, malbona Esperanta romano.. Kiu volas riĉigi sian pasivan lingvoscion, elektu alian libron por legado. Kaj kiu ankoraŭ ne legis la romanon, nepre legu ĝin – en la originalo, aŭ, se eblas, en la gepatra lingvo.

Zsuzsa *Varga-Haszonits*

Moderne sorĉa etoso

La ĝardeno de la urbestro. Novelaro en du lingvoj de Lina Gabrielli. Eldonis: Plejado, Ascoli Piceno, 1978. 112 p., 20 cm. Prezo: 12,– ned. gld.

Kiomfoje ni preteriras malgrandajn momentojn de l' ĉiutagoj! Estas instrue, kiel Lina Gabrielli lasas sin emociigi de siaj observoj kaj prezentas la eĥojn de sia gracia, lirikeca sentemo. Nelongaj rakontoj, propradire felietonoj ariĝas en la belaspekta libro, kiuj elradias delikate ĝojon, doloron, foje angoron – por laŭde diri, proporcie al la modesteta gravego de kaptita museto, de funebrinda katido, de *efemeraj*, tamen profunde intimaj homecaj sentoj. La majstre konstruita monologo de „Kara Kranio" ŝajnas al mi la plej impresiva – sendepende de ties Esperanta medio, la kongreso en Ateno. Mi neniel miras, ke ĝia itallingva varianto, – kiel pluraj aliaj noveloj – akiris premion de l'itala ĵurnalista asocio. La ĝenro de felietonoj postulas koncizeman, laŭeble klaran stilon, certe ne la nuntempe modan inund-vortan prozon, kaj tiun postulon la verkistino kontentige plenumas. La ĉarmo de ŝia rakontemo, la karese flua facila lingvo multe plaĉos al la ŝatantoj de amuzaj legaĵoj, inkluzive eĉ komencantojn. La leganto sentos kvazaŭ kunveturi per ŝia aŭtomobilo, sub la blua tendo de la itala ĉielo, survoje al la Monteto S. Marko, en etoso moderne-sorĉa . . .

La samaj noveloj aperas en la itallingva parto de la libro. Estas originala fenomeno renkonti en du lingvoj *paralele verkitajn*, tute ne identajn novelojn. Komparante ambaŭ tekstojn mi trovis, ke la Esperanta paralelaĵo estas ofte pli esprimriĉa, kaj la itallingva teksto foje reduktiĝis. Kompreneble tia kontrasto foje rimarkeblas inverse, videble, ne temas pri tradukado el unu lingvo al la alia; en ambaŭ okazoj leĝera stilo, esprimivo alligas la atenton.

Ervin *Fenyvesi*

recenzoj - recenzoj - recenzoj

Esperanto en la homa socio

Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado. Studoj. Red.: Detlev Blanke. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio. Budapest, 1978. 228 p., 19 cm. Prezo: 13,80 ned. gld. (Por Hungario 60,– forintoj.)

Estus malfacile diri, kiom da valoraj studoj pri diversaj aspektoj de Esperanto ŝimas en diversaj revuoj. En plej bona kazo ili elvokas kelkan diskuton tuj post la apero, sed baldaŭ ili forgesiĝas, kaj nur pedantaj specialistoj povas revivigi ilin okaze de bezono helpe de sia sliparo. En tiu ĉi libro aperas dek tiaj studoj de D. *Blanke*, E. K. *Drezen*, M. I. *Isajev*, S. N. *Podkaminer*, kaj Á. *Rátkai*.

Ĉiuj dek studoj havas unu gravegan komunan trajton: ili ekzamenas la Esperanto-movadon ne izolite, sed en la kunteksto de la evoluo de la homa socio. Tiu strebado povas alporti duoblan utilon al ni: *unue*, aplikante la metodojn de diversaj sociaj sciencoj, ni povas ekscii multe pli pri ni mem, ol tio eblus ĉe izolita esplorado, kaj *due*, ĉar tiamaniere ni povas konvinkiĝi, ke ni, esperantistoj, ne estas ia „fremda ero" en la homa socio, sed ni havas difinitan lokon kaj rolon en ĝi.

La volumo dividiĝas je tri sekcioj: *Historio*, *Ideaj fontoj* kaj *Perspektivoj*.

En la unua sekcio *Rátkai* analizas la teoriojn pri la universala lingvo en la Internacia Laborista Asocio, meze de la pasinta jarcento; *Podkaminer* krevigas legendojn kaj kalumniojn pri la rilato de *Lenin* al Esperanto; Blanke raportas pri interesa apliko de Esperanto en la dudekaj jaroj, kaj pri la historio de la Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE). Aparte salutinda estas represo de *Esperanto dum la Tria Regno* de *Lins*, kiu studo entenas faktojn, pri kiuj ni ne rajtas forgesi eĉ por momento.

En la dua sekcio represiĝas la konata studo de *Drezen* pri Zamenhof, kaj aperas interesa verko de *Rátkai*, en kiu li pruvas, ke la plimulton de la bazaj principoj de esperantismo kreis la Volapuka movado! Certe vekos ankoraŭ diskutojn la studo de *Blanke* pri la „interna ideo". Li bele vicigas la negativaĵojn, sed preskaŭ tute forgesas pri tio, ke tiu koncepto – sen kiu Esperanto tute certe jam delonge ne ekzistus – enhavas ankaŭ elementojn evolukapablajn kaj evoluigendajn.

La du studoj de la lasta sekcio – *Perspektivoj* – estas iom tro skizaj: ili nur lanĉas temojn, sed ne eksplikas tiujn detale.

Resume ni devas konstati, ke temas pri libro aparte valora kaj iusence unika: ĝi devas troviĝi sur la librobreto de ĉiu aktivulo de nia movado, kiu konsideras sian esperantistecon pli ol nura agrabla tempopasigo.



Majstraĵo el Nordo

Brand. Drama poemo de Henrik Ibsen. El la norvega lingvo tradukis Erling Anker Haugen. Eldonis: TK/Stafeto, Antverpeno-La Laguna. 320 p., 21 cm. Serio „Oriento-Okcidento" n-ro 13. Prezo: 20,– ned. gld.

Ibsen estas la giganta norvego, kies nomon konas eĉ personoj, kiuj malcertas pri la preciza geografia situo de Norvegio. Ankaŭ inter esperantistoj lia nomo estas konata: tio ŝuldiĝas unuavice al la fakto, ke troviĝis genia tradukisto, Erling Anker *Haugen*, kiu en la jaro 1951 donacis nin per majstra traduko de la plej konata verko de Ibsen: *Peer Gynt*.

Brand estas verko malpli konata, sed neniel malpli valora. La ĉefheroo Brand estas ial antipodo de la flirtema, petola Peer Gynt: li pretas riski sian vivon por plenumi la *devon*, kaj ni nepre sentas simpation al li, kiam li kontraŭbatalas la vokton, kiu kvazaŭ sentence konceptas oportunismon:

Min ankaŭ gvidas devinstinkto, –
sed nur interne de l' distrikto.

Tamen, baldaŭ evidentiĝas, ke Brand ne estas heroo de niaj revoj. Lia konsekvenceco, firmeco iom post iom fariĝas nehoma: mankas el li indulgo eĉ por sia propra patrino.

Alternas konsternaj, fortimpresaj bildoj: ni vidas lin forrezigni pri ĉio sia, por nobligi homojn, sed samtempe ni spertas, ke li havas nenion komunan kun ili. Brand fakte ne konas la homojn, kaj certe ne amas ilin; direktas liajn agojn nur ideoj, kaj li plene forgesas, ke tiuj ideoj naskiĝis iam por *servi* homojn, por helpi al ili orientiĝi en la vivo. La tragedio de Brand ĝis nun restas terura instruo por ĉiuj, kiuj volas nobligi aŭ feliĉigi homojn kontraŭ ties volo.

La traduko de tiu ĉi verko, kiel ankaŭ tiu de *Peer Gynt*, estas majstra. Haugen sukcesis atingi en siaj Esperantaj versoj filozofian densecon kaj konversacian elanon samtempe: eĉ dum momento oni ne havas dubon pri tio, ke la traduko eminente taŭgus por scenejo.

La erudicia 20-paĝa postparolo de *Kalocsay* riĉe informas pri la cirkonstancoj, inter kiuj *Brand* estis kreita, kaj konvinke interpretas la mesaĝon de Ibsen.

Ricevu apartajn gratulojn la eldonejo TK/Stafeto pro la tre bela kaj originala aspekto (brunlitera presado kaj tre bonaj ilustraĵoj) de la libro.

Vilmos *Benczik*

Zsigmond Móricz

estas la plej granda kritik-realisma hungara verkisto. En nia nuna krucenigmo ni kaŝis la titolojn de liaj verkoj. Ensendi sufiĉas nur tiujn (H1., H12., H82. kaj V15., V28., V51.) ĝis la 1. de julio al nia adreso (HEA, Budapest, Pf. 193., H–1368.). Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

HORIZONTALE: 1. *Novelo de Móricz* 12. *Novelo de Móricz* 15. Genro de kapopieduloj 16. El koro 18. Ŝpinisto de majstraj retoj (R) 19. Ripoztago (R) 21. Bastono uzata ĉe golfludo (R) 22. Pegoforma birdo (R) 23. Kriptono 24. Granda tereno de la homa kulturo (–o) 26. Ĝenerala pronomo 27. Uranio, sulfuro, oksigeno 28. Granda lago en Azio 30. Rigidhara herbo (R) 32. Metalo (R) 33. ST 34. Elmontri la mankojn de iu (R) 36. Punkto de la ĉiela sfero (R) 38. Natria karbonato 39. Vircervo (R) 41. Parto de la versfarado 43. Rilate al surstepa birdo 45. Gaso (R) 47. Epiteto de la muĝanta maro 48. Paroli vortojn por skribigi ilin (R) 49. Mamulo el Sud-Ameriko (R) 50. Nazmalsane 51. Koncernanta la komunajn ekonomiajn interesojn de la ŝtato (R) 53. Oksigeno, titanio 54. Varbi por politika celo (R) 55. Parto de la koksosto 57. Mamulo el la subordo de fokuloj 59. Aŭtoj el Hispanio kaj Italio 60. Mallongigo de polietileno 62. Farendaĵo 64. Akvomaso 65. IME 66. Greka litero 70. Senrezulta matĉo (!) 71. Membris 72. Perioda enspezo por la uzado de la grundo 74. Malsaĝaj homoj 76. Ekstera parto de la bakaĵoj (R) 77. Havi ion en io (–i) 79. Latina formo de Odiseo 80. Luktanto por la novaj ideoj (R) 82. *Novelo de Móricz*.

VERTIKALE: 2. Verbotempo en la helena lingvo 3. Ebenaĵo en Suda Ameriko en la valo de Orinoco 4. Simbolo de la geedziĝo (R) 5. IGE 6. La kvara litero de E-a alfabeto prononcate 7. Japana, Kamboĝa kaj Itala aŭtoj 8. . . . homo estis J. Baghy 9. Fabela motivo (–o) 10. Parto de la vizaĝo (R) 11. Jovo (!) 12. Tropika insekto (R) 13. Neĝdometo de la Eskimoj 14. Movo svinganta la korpon antauen (R) 15. *Novelo de Móricz* 19. Metala fadeno (R) 20. Vico de veturiloj (–o) 23. Akra voĉo 25. Scienco pri la aplikado de radiokrea energio 28. *Verko de Móricz* (Ĝia titolo estas tradukita alie en artikolo, aperanta en tiu ĉi numero.) 29. Maldika presproduktaĵo 31. Speco de mezlernejo 4. Fotografisto kun specifa aparato (–o) 35. Ano de la virina enlinio 37. Muzikaparato en la poŝo (R) 38. Kemia elemento 40. Trompita edzo (–o) 42. Kondamno je Infero (R) igo 45. Patro de la patro 46. Maljesi 51. *Novelo de Mó-* dispronoŋcanta konsonantojn 54. Brulego 56. Ekspluala hazardaĵoj (–o) 58. Membroj 59. Krei kaj cirkuligi ravaĵo sub la fenomenoj (R) 63. Rilata al la aŭdorgano



65. Nenormala superfluo de akvo (R) 67. Indio kaj teluro 69. Ies ajn (!) 71. Multegon 73. Ĝi estas sub la piedoj (R) 75. Malmola parto de korpo (R) 76. Demando pri la loko 78. Japana ludo 80. Se paroli pri (m11).

La ĝusta solvo de la krucenigmo aperinta en la 6-a numero de Hungara Vivo estas: „. . . finan sukceson de nia lingvo, sed ankaŭ prezenti ĝiajn atingojn al dubanta mondo.", Intimo, La kaptito. Libropremion gajnis: Jerzy Banacki el Pollando kaj Gábor Fogarassy el Hungario.

Imre *Szabó*

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

„EL LA VERDA BIBLIO"

En siaj postvortoj al la libro, Vilmos *Benczik* skribis: „Tiu ĉi libro de Lejzerowicz certe trovos multajn ŝatantojn, ĉar inter la ekzistantaj Esperantaj satiroj ĝi apartenas al la plej bonaj."

Do, ni trafoliumu ĝin.

1. Kiam kaj kie naskiĝis Izrael *Lejzerowicz*, la aŭtoro de „Verda Biblio"?
2. Bonvolu alsendi la daŭrigon de la frazo:

„16. Junio Pagi estis profeto. El orienta Budapeŝto li venis por . . ."

3. Kiu ĉapitro komenciĝas per la frazo: „1. Vivis viro inter la verda popolo kaj lia nomo estis Malkontentulo."?

Por la rubriko „Ekzameno sen risko", aperinta en la ĉijara 1-a numero de Hungara Vivo, la plej precize solvis la demandojn:

1. Jerzy Banacki, ul. B. Glowackiego 44/46 m. 53. PL 97-200 Tomaszow Maz. Pollando
2. Pap Tibor, Trombitás u. 12. 4031 Debrecen, Hungario
3. Ivan Korolev, u. Bijsk -16. Altajskova kraja, p. k. 5. 659316–USSR

La libroj estas jam ekspeditaj.

HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H–1368 Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj postoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215–96–162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 66,- al eksterlando por unu jaro 78,- forintoj. * Peranto al eksterlando: KULTURA, Budapest, P. O. B. 149. H–1389 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,-Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. - 79-7087 Somogy megyei Nyomda Responda gvidanto: Béla Farkas, direktoro. * **Indexszám: 25 377 ISSN 018-7704.**

LETERKESTO

F. N. Marseille, F.: En la disputoj vi pravis. Aurel Stromfeld estis i.a. tre klera homo, studema kaj alte kulturita generalo. Tio klarigas lian vivovojon, ties preskaŭan paralelecon al tiu de Theodor Körner rilate la politikan konduton, ties evoluon. Ambaŭ estis altrangaj oficiroj de la Monarkio, sed ni devas atentigi vin: estis Körner, kiu post falo de hitlerismo iĝis socialista prezidento de Aŭstrio, kaj konsideris sin „demokrata bolŝeviko" en la socialista partio, male Stromfeld iĝis komunista partiano, formale restinta en la socialdemokrata partio, ĉar la KP tiam devis agadi tute sekrete.

Hector Boffejon, Svisujo: certe, la frazero „surkape kun cilindra ĉapelo" (HV 78/5 p. 172.) estas formulebla ankaŭ *sen* prepozicio. Tamen la supra formo ne enhavas hungarismon do sensencan „kretenismon", ĉar la logika rilato inter viro kaj ĉapelo estas esprimebla per la prepozicio „kun". – En la sama numero (p. 191.) la tuboj vere „eraris", ili ja malhavas ne muzikpecon, sed juntojn. Koran dankon pro via atentigo.

K. Istomin, Leningrad, SU: Vi kaj viaj samurbanoj nepre havas antaŭrajton – suferintaj pli ol trijaran teruran blokadon dum la milito far la nazi-armeo – protesti kontraŭ ĉia agreso, defendi la ofte minacitajn interesojn de paco kaj libereco. Por haltigi la vetarmadon, mobilizi la homan konsciencon, kompreneble oni devas malfermi la okulojn de la nebule vidantoj. Oni ne imagu optimisme, ke ĉiu bonintenca homo vidas klare la manovrojn kontraŭ la homaro.

Boris G., Barnaul, Siberio, SU: ni bedaŭras, se la recenzo pri la tre interesa japana dokumentromano estis iel miskomprenebla. Nia recenzo substrekis la historian valoron de literatura interpreto pri la iama japana laborist-movado, kiu meritas la konon flanke de la juna, same kiel de la maljuna generacioj. Tamen, se temas pri literatura verko, romano, ne eblas neglekti ties *artan* prijuĝon – apud la memorinda, kuraĝiga desegnado pri la kontraŭfaŝismaj luktoj. Literaturaĵoj estas ofte tre legindaj pro la enhavo, eĉ se ili ne havas literature tre altajn valorojn.

Lentaigne, Montpellier, F.: „Klavo" certe ne identas kun „dianto"; temas simple pri tio, ke nia redaktoro eble faris tro abundajn studojn pri la portugala revolucio de 1974, kaj trudiĝis sur lian plumon la portugala vorto *cravo* kun certa modifiĝo en la enkonduko de nia numero 1978/5. Li pardonpetas vin kaj ĉiujn legantojn pro la malatento.

Korespondi deziras

Speleologo (29) ktm. en E, A, litova, rusa lingvoj pri kavernoj, foto, turismo, kol. bk, foto, diapoz. de kavernoj. Erikas E. *Laiconas*, SU-Litovio, *Kaunas-C*, poste restante. – Gekuracistoj, flegistinoj, kursanoj ktm. Adr.: s-ino Rajna *Kasabova* fakdelegito, BG, *Ŝumen*, str. Kiril k Metodi 84. – Pri literaturo, arto, naturo, psikologio, ŝako k.a. S-ro Jan *Vedevik*, S–40 101 *Göteborg–1*, poste restante. – F-ino Stefania *Mazurek* (21) flegistino, pri junularaj aferoj, E-libroj, kolorbk, muziko leĝera, precipe kun hungaroj. PL–05–200 *Wolomin* (ĉe Varsovio), ul. Polna 4/22. – Instruisto de angla lingvo, pri liter., lingvoj, historio, geografio, kino, teatro, muziko, vojaĝoj. S-ro Zlatko *Stojanov* (44) BG-9010 *Varna* ul. „ROZA" blok 20/2G. – 25–35 jaraj grupanoj pêt, interŝ. pm, bk, ins, suvenirojn k.a. el Ukrainio, urbo *Ŝostka*, SU–245110: Anatolio *Dovbiŝ*, Rus-Telegrado, POB 27. – Anatolio *Romasko*, en Kulturdomo ĴDANOV. – Volodja *Aleksandrov*, K. Marx u. 101. – Kostja *Stiĉinskij*, Komunistiĉeskaja 6–7. – D-ro Rozin Vl. *Nednov* (43) dentkuracisto, eventuale reciproka gastado, pri muziko, sporto, turismo. BG–7012 *Ruse* ul. 6 Septemviri 90. Blok „Rusia". – Esperanton lernas en la lernejo (ĝenerala liceo) 16–18 jaraj polaj junuloj, interesiĝas pri diversaj sciencoj, muziko, arto. Certe respondas: Gregor *Baranek*, PL–08–440 *Pilavo*, str. Lesna 6/1. – Katerina *Boratynska*, 08–406 *Trabski* 38. – Waldemar *Buczkowski*, 08–440 *Pilavo*, str. Al. Wyzwolenia 234. – Katerina *Jaczewska*, 08–440 *Garvolino* str. Kosciuszki 11/39. – Malgorzata *Morawska*, 08–400 *Garvolino* str. Dluga 7/29. – Marko *Niedzwiedt*, 08–410 *Laskerzew* str. Chopina 28. – Teresa *Kowalczyk*, 08–470 *Wilga*, str. Miczkiewicza 35. –

PIONIRO – jam 13 jara

Ĉu vi jam aŭdis pri la infana revueto PIONIRO? Vane vi serĉus ĝin en la listo de la Esperantaj periodaĵoj sur la lastaj paĝoj de la librokatalogo de UEA. Kaj same vi ne trovus pri ĝi aludon en aliaj Esperantaj revuoj. Kial? Eble temas pri supereca ignoro, sed tre facile povas esti ankaŭ, ke la numeroj de PIONIRO ne atingas la redakciojn de tiuj eldonaĵoj.



Kvankam 13 jaroj estas respektinda aĝo ĉe Esperanta periodaĵo, precipe, se temas pri porinfana revueto, kiu eĉ havas la virton *aperi ĉiam regule 10-foje dum la jaro!* Ĝi estas sendata al dudeko da landoj, precipe al esperantistaj pedagogoj, kiuj utiligas ĝin en la instruado de la Internacia Lingvo.

La ĉarme desegnita, dukolore presita kovrilo entenas tre bele stencilitajn paĝojn, sur kiuj aperas eĉ desegnaĵoj, farĵtaj de infanoj. La enhavo konsistas el bone tradukitaj kantetoj, poemetoj, raportetoj de infanoj, ŝercoj, kaj aperas eĉ krucenigmo, kies solvintoj estas premiitaj. Oni povas diri, ke la tuta revueto estas vere *por*infana, pri kio oni ne miru, ja ĝin redaktas s-ino Helena Hegedüs, kiu – laborinte en pluraj Infanaj Kongresetoj – havas vere realajn spertojn pri la bezonoj de la plej junaj esperantistoj. La revueton eldonas la Esperanto-Grupo de la Pionirdomo „Szabó István" en Pécs.

PIONIRO ordinare ne estas vaste distribuata, tamen, la partoprenantoj de la UK en Lucerno povas aboni ĝin por la lernojaro 1979/80 ĉe la kongresa libroservo.

Dum ekskurso,
ĉe sporto

en teo,

en limonado

Kun detalaj informoj ni estas je dispono de niaj klientoj
MIKÖV 1025, Budapest, XX., Nyári Pál u. 88. Pf. 75.
Telefon: 176–716, 573–088

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

BÁV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért